# LA MALLARĜA VOJO

N-ro 4 / 2017
9-a jaro

Temo:

## Sinjoro, mi konsentas …



Biblia citĵo:

Miaj fratoj, mi ne rigardas min kiel jam ektenantan; sed nur jene: forgesante tion, kio estas malantaŭe, kaj strebante al tio, kio estas antaŭe, mi min pelas al la celo, por akiri la premion de la supera voko de Dio en Kristo Jesuo.

Filipianoj 3,13-14

## Enhavo


| | |
|---|---|
| Kara leganto | 3 |
| La maljuna viro kaj la maro | 4 |
| Sinjoro, mi konsentas | 6 |
| Malferma vorto de Wilhelm Busch | 13 |
| Menno Simons | 19 |
| La anabaptistoj | 29 |
| Mia bapto | 35 |
| Musik-industrio | 39 |
| En propra afero | 47 |



Eldonas:
**Christlicher Gemeinde-Dienst (CGD)**
Verein zur Förderung christlicher Werke und Gemeinden Pforzheim e.V.
E-mailo: info@cgd-online.de
Hempaĝo: www.cgd-online.de

**Sekretariejo** (redaktaj kontribuoj)**:**
Dr. Lothar Gassmann
Am Waldsaum 39
D-75175 Pforzheim
Tel. (AB) 07231-66529
Faksilo 07231-4244067
E-mailo: Logass1@t-online.de
Hejmpaĝo: www.L-Gassmann.de

Kompostado, fotoj: Lothar Gassmann
Titolfoto: Ruĝa rozo en nia ĝardeno
Foto por la artikolo Menno Simons:
Baptoekspozicio: Viktor Fast, Frankenthal
Kovrilpaĝoj: Werner Fürstberger
Presis: Druckmaxx, Blekendorf
Esperantigis: Vinko Ošlak


Por la subskribitaj kontribuoj respondecas la ĉiama aŭtoro. Ĉiuj kontribuoj en tiu ĉi kajero – se ne alie indikite – rajtas esti, sen ŝanĝoj kaj kun indikita fonto, kopiitaj, represitaj kaj tradukitaj en alian lingvon. Ni petas specimenon. Ni dankas
.


**CGD-Sekretariejo**
(Dissendado, konfirmado de donacoj):
Thomas Ebert, Alemannenstr. 5
D-75038 Oberderdingen
Tel. 07258-295452
E-mailo: info@cgd-online.de


**Donackontoj**

***Germanio:***
Sparkasse Pforzheim-Calw
Christl. Gemeinde-Dienst Pforzheim
IBAN: DE89 6665 0085 0007 2389 67
BIC aŭ SWIFT: PZHSDE66

***Aŭstrio:***
Raiffeisenbank Leiblachtal
Christl. Gemeinde-Dienst Pforzheim
IBAN: AT07 3743 9000 0380 8045
BIC: RVVGAT2B439

***Svisujo:***
Die Schweizerische Post:
Christlicher Gemeinde-Dienst Pforzheim
Verein zur Förderung christlicher Werke und Gemeinden e.V.
DE-75175 Pforzheim
IBAN: CH32 0900 0000 6074 9747 5
BIC: POFICHBEXXX

La gazeto LA MALLARĜA VOJO estas distribuata surbaze de donacoj al interesitoj (Abokostoj jare 15,- € inkl. sendado). La kostoj kovrataj ekskluzive per propravolaj dediĉoj (donacoj) de legantoj. Dankon, se vi nin helpas.
La CGD estas rekonata kiel organizaĵo en komuna intereso. Dediĉitaj sumoj ĝis 20 % dejarenspezoj imposte dekalkuleblaj. **Citu donacante vian poŝtkodon kaj amiknumeron, ni petas.** Ĝi troveblas sur la adreskampo sur la dorsopaĝo.
Koran dankon.

# Kara leganto!

**Kiamaniere mi rekonas la volon de Dio?**

1. La volon de Dio mi baze rekonas pere de legado de la *Dia vorto* en la Biblio kaj per la *obeemo* al tio, kion la Dia vorto al mi diras. Ĉar la volo de Dio neniam povas esti en kontradikcio al Lia vorto.

2. La volon de Dio mi aldone rekonas, kiam mi Dion per *preĝo* por Lia gvidado petas. Ĉe tio mi povas fidi, ke Li jam min gvidas ek de la momento, en kiu mi Lin por Lia instrukcio petis. Mi devas nur atenti la *montrofingron de Lia gvidado*.

3. La volon de Dio mi rekonas per la *interparolado kun maturiĝintaj kristanoj*, kies konsilon kaj vivsperton mi dankeme alprenas. Tamen mi iliajn dirojn ne rajtas absolutigi (ja foje mi ricevas kontraŭdirajn konsilojn), sed mem ilin el-provi surbaze de la Dia vorto kaj preĝo.

4. La volon de Dio mi finfine rekonas helpe de *cirkonstancoj*, en kiujn Dio min per Sia ĝistiama gvidado poziciis. Tamen mi ne devas min simple lasi super-regi de la cirkonstancoj, sed mi devas resti malfermata por la Dia daŭra kon-dukado – kaj por tiel eventualaj ŝanĝoj.

*Post kiam ni en la n-ro 1 / 2017 elĉerpe konsideris la luterajn kaj reformitajn ekleziojn kaj la neprecon de nova reformacio, en tiu ĉi resuma eldonaĵo pri la reformacia jaro 2017 la centra punkto devas troviĝi ĉe la eklezioj de la anabap-tisma kaj menonisma origino. Du kontribuaĵoj prezentas ilian komprenon de la komunumo en la pasinto kaj en nuno, La tuto ricevas kadron per la kritika prit-rakto de la konata junulara paroĥestro en Essen Wilhelm Busch el la jaro 1956 pri la bapta praktiko en la provincaj eklezioj, kio ne perdis aktualecon, kaj same pri persona bapta atestado.*

Dio, la Sinjoro, vin benu! *Via Lothar Gassmann*

## *La pensoj de la maljuna viro*

# La maljuna viro …

*kaj pri io pli*

Ĉu ni konas ankaŭ tion? Ni estas malkontentaj pri tio, kion Dio al ni donas. Ni volas akiri pli de la vivo, pli da ĝojo, pli da sano, pli da mono, pli da honoro, pli da agnosko, pli da atento, pli da tempo, pli da trankvilo, pli da konsidero. Sur la spirita kampo ni deziras por ni pli da certeco, pli da konsolo, pli da elaŭditaj preĝoj, pli da fido, pli da perfekteco, pli da komisiiteco, pli da donacoj, pli da povo, pli da Sankta Spirito.

Ni sopiras je novvekiĝo, je fortega spirita efiko, je konfirmado de nia agado kaj servado per sekvaj signoj kaj benoj. Ni perceptas nian fidon kiel feblan kaj nesufiĉan. Ni petas Dion por pli da Spirito kaj pli da komisiiteco. „Jesuo, via lumo, plenigu tiun ĉi landon per la honoro de la Patro! Venu, la Sankta Spirito, igu la korojn bruli!“

Sed la komunumo de la Sinjoro bezonas neniun novan „elverŝon de la Spirito“. La Sankta Spirito *estas* elverŝita. Ni ne bezonas novan pentekoston. La pentekosto estas unika savhistoria evento. Tio, kion ni bezonas, estas la nova sindispono al la Sinjoro, nova fidelo kaj nova obeemo al Lia vorto.

Se la Dia vorto nin kontraŭdiras kaj korektas, ni ne rajtas ĝin turni aŭ klini, sed ni devas penti. De nia rilato al la Dia vorto dependas nia spirita vivo! La Dia vorto havas la potencon, en la homoj, kiuj ĝin aŭdas, efiki la fidon kaj la obeemon kaj tiel la savon kaj novnaskiĝon. Se ni timas antaŭ Dio kaj Lin amas, tiam ni ankaŭ Lian vorton renkontos per diotimo kaj obeemo.

Pli ol tion ĉi ni ne bezonas. Dio pridonacis nin per ĉio. En Kristo ni havas la tutan plenon de Dio. En Kristo kaŝe kuŝas ĉiuj trezoraĵoj de la saĝo kaj de la rekono. Tio ĉi sufiĉas ĝis la tuta eterno. Ni ne bezonas „la duan benon“. Ĉu la Sinjoro Jesuo Kristo estas por ni ĉio? Ĉu ni estas plene orientitaj al li? Se ni vivas el propra potenco, tiam ni ŝtopas la fonton de la beno. Nia savo plene baziĝas en nia Sinjoro Jesuo Kristo kaj ne sur tio, kio *ni* estas kaj mion *ni* havas. Pli da io ajn ni ne bezonas.

Ĉiu kredanto ricevas okaze de sia novnaskiĝo la Sanktan Spiriton. Por iuj tio estas tro malmulte. Ili volas pli. Ili volas esti trablovataj, trafluataj, esti metitaj en trancon, senti la Sanktan Spiriton korpe kaj Lin percepti. Satano provas

trompi tiujn kristanojn per senttravivaĵoj, vizioj kaj animaj sopiroj. Li trenas ilin for de la vorto al la animecaj spertoj.

Kontraŭe al tio la Sankta Spirito efikas sobrige kaj stimulas memkontrolon. Dion oni ne devas „senti“, por esti proksime al Li. „Eĉ se mi nenion sentas de Via potenco, Vi tamen min gvidas al la celo, ankaŭ tra la nokto.“ Ni iras en la fido kaj ne en la vido. Ni bezonas spirite efektivigitan sindonon al nia Sinjoro, kiu nin deaĉetis per sia sango. Ni volas por li vivi, ne plu por ni mem.

Multaj kristanoj sopiras pri pli da komisiiteco. Ili suferas pro tio, ke la mondo troviĝas en malico. Ili volas en la nomo de Kristo la Dian Regnon efektivigi ĉi tie kaj nun. Ili sentas sin komisiitaj, la Regnon de Jesuo Kristo aperigi ĉi tie kaj nun. Satano sufloras al ili, ke ili povus helpi al la venko de la Dia Regno. Pere de la „proklamado“, pere de la „ekzistala parolo“ kaj „ordonado“ povus laŭ ilia opinio la efikado de Dio esti „lanĉita“ kaj la regado de Jesuo esti realigata jam nun.

La vorto de Dio nenie parolas pri tio, ke la komunumo estas vokata ekzerci sian aŭtoritaton super Satano. Ni devas rezisti kaj supervenki, sed ni ne povas lin „ligi“ kaj elpuŝi lin el la mondo. Ni devus en la fido insisti ĉe la venko de Kristo. La apero de la Dia Regno estas ekskluzive la faro de Dio. Ia ajn homa kunfaro ĉi tie estas ekskluzivita. „La regno de la mondo fariĝis regno de nia Sinjoro kaj de Lia Kristo; kaj li reĝos por ĉiam kaj eterne“ (Apokalipso 11,15).

Ni estas kiel la novnaskitaj kristanoj la infanoj de Dio. La Sinjoro Jesuo Kristo pagis nian kulpon per sia morto surkruce kaj nin savis. Ni atendas novan ĉielon kaj novan teron, kie la justeco troviĝos. La suferoj de la tempo ne estas valoraj de la gloro, kiun Jesuo Kristo por ni preparis. Jesuo nura estas la Savanto de nia vivo. Li estas nia ĝojo kaj nia paco. Ni pli da io ne bezonas.

*Rolf Müller, Wilkau-Hasslau*

# Sinjoro, mi konsentas …



**Sinjoro, mi plene konsentas kun Vi en via prijuĝo de mia vivo.**

1. Sinjoro, mi konsentas, ke Vi min amas kaj ke mi ĝuste estas la persono, por kiu Kristo mortis.
2. Sinjoro, mi konsentas, ke Vi havas planon por mia vivo kaj ke, se mi vivas koresponde kun tiu plano, mi atingos la plej altan gradon de feliĉo kaj de uzebleco (Sen 3,5-6, Mat 5,3-12, Fil 2,12-13, Heb 13,20-21).
3. Sinjoro, mi konsentas, ke tro da mia vivo preterpasis sen sufiĉa spirita kresko kaj ke mi ne rajtas plu malŝpari ankoraŭ pli da tempo kaj oportuneco (Efe 5,14-17).
4. Sinjoro, mi konsentas, ke mi hodiaŭ probable vivas mian lastan tagon – kaj ke mi per saĝo ĉiun tagon devas atenti tiel, kvazaŭ ĝi estus la lasta, por povi ĝin vivi ekskluzive por adori Vian gloron (Psa 3,5; 90,10, 1 Kor 7,29, Jak 4,14-17).

5. Sinjoro, mi konsentas, ke Vi, surbaze de la fakto pri la ofera morto de Kristo, min deaĉetis, kaj Vi havas la rajton regi super mia tuta vivo – kaj pro tio mia tempo, mia mono, mia posedo, miaj negocoj, mia familio, miaj celoj, mia sopirado, mia konduto, miaj vortoj kaj miaj pensoj devas troviĝi sub Via kontrolo (Rom 14,8, 1 Kor 6,19-20).

**Sinjoro, mi konsentas kun Vi koncerne ĉiujn miajn pekojn.**

1. Sinjoro, mi konsentas, ke la peko en mia vivo ĉiam estis tre reala problemo kaj tio daŭre estas kaj ke mi pro tio meritas iri en la inferon (Rom 3,9-12, 7,24, Efe 2,1-2, Heb 12,1).
2. Sinjoro, mi konsentas kun Vi, ke la granda malico de ĉiuj miaj pekoj ĉiam troviĝis en tio kaj daŭre estas, ke ĝi estis celita kontraŭ Vi. „Antaŭ Vi sola mi pekis, kaj mi faris tion, kio estas malbona antaŭ Viaj okuloj“ (Psa 51,4) „Kiel do mi faros ĉi tiun grandan malbonegon kaj pekos antaŭ Dio?“ (1 Mos 39,9)
3. Sinjoro, mi konsentas kun Vi, ke nepras pento super ĉiuj miaj pekoj kaj ke mi devas ĉesi ekspluati Vian bonecon, se mi ne atingas pentadon (Rom 2,4), kaj ke mi ne povas sperti la revivigon, kiu kunportas la revekiĝon, ĝs tio okazos (Ago 3,19).
4. Sinjoro, mi konsentas, ke persona konfeso de la personaj pekoj devas esti praktikata regule. „Tial, se vi prezentas vian oferon ĉe la altaro, kaj tie memoras, ke via frato havas ion kontraŭ vi, lasu tie vian oferon antaŭ la altaro, kaj foriru, unue paciĝu kun via frato, kaj poste venu kaj prezentu vian oferon“ (Mat 5,23-24)
5. Sinjoro, mi konsentas, ke por ĉiu, kiun mi privilegiis, rebonigo estas la nepra kondiĉo por la persona revekiĝo (2 Sam. 12,6, Jer 35,15, Jzk 33,15, Luk 19,8), ĉar sciante, ke mi iun alian trompis kaj tion ne rebonigis, min malhelpos havi liberan konsciencon antaŭ la akuzo kaj mi devos lasi al la koro, kiu min malbenis kaj miajn preĝojn baris (1 Joh 3,20).

**Sinjoro, mi konsentas kun Vi pri la vivo en sanktiĝo.**

1. Sinjoro, mi konsentas kun Vi, ke sen la sanktiĝo neniu homo Dion vidos (Heb 12,14).

2. Sinjoro, mi konsentas, ke por la sanktiĝo estas Via volo por mia vivo. „Ĉar jen estas la volo de Dio, via sanktiĝo, ke vi vin detenu de malĉasteco“ (1 Tes 4,3)

3. Sinjoro, mi konsentas, ke Vi postulas de mi nenion, kio estus malebla, kaj ke mi devas ĉesi mian mankon je sanktiĝo ekskuzigi per la vortoj „Dio komprenas, mi estas nur homo“.

4. Sinjoro, mi konsentas, ke la sanktiĝo estis deaĉetita sur lia kruco per la sankteco de Kristo (1 Kor 1,30) kaj samtiel kiel la justiĝo estas akirata per la fido (2 Tes 2,13).

**Sinjoro, mi konsentas kun Vi pri la absoluta nepro, severe gardi super ĉio, kion mi alprenas.**

1. Sinjoro, mi konsenas, gardi super ĉio, kion mi legas kaj alrigardas: librojn, magazenojn, filmojn, homojn („Mi faris interligon kun miaj okuloj, ke mi ne atentu virgulinon“, Hiob 31,1), reklamtabulojn ktp., kaj ke por mi estus pli bone, resti sen la okuloj ol la okulojn havi, kiuj min povus venigi en la inferon (Mat 18,9-10).

2. Sinjoro, mi konsentas, gardi super tio, kion mi alaŭskultas: malbonajn ŝercojn, malican klaĉadon, kritikon pri aliaj, flatadon, falsajn religiajn vidpunktojn, senbridajn rakontojn ktp. Mi atentos la vortojn de Jesuo: „Atentu do, kiamaniere vi aŭdas“ (Luk 8,18; Mar 4,25).

3. Sinjoro, mi konsentas, gardi super tio, kion mi ektuŝas kaj kiamaniere, sciante pri la narkote falsa paŝo en la pekojn de avido kaj dezirego (2 Mos 20,17, Sen 15,27, Mat 6,27-30).

4. Sinjoro, mi konsentas atenti pri tio, kion mi manĝas kaj trinkas kaj super la kialoj, ja mi scias, ke la manĝemego kaj drinkemo en Viaj okuloj estas malbono (Psa 34,8, 119,103, Sen 23, 2-3, 20-21, Luk 21,34, Rom 16,18, 1 Kor 10,31, Gal 5,19-21, Fil 3,19, Jak. 1,13-15).

5. Sinjoro, mi konsentas, gardi super mian tutan korpon, ja mi scias, ke mia korpo estas la templo de la Sankta Spirito (Mat 10,28, Rom 6,12, 8,13, 1 Kor 6,19, 1 Kor 9,27).

**Sinjoro, mi konsentas kun Via vido super la dividita pensado kaj super la nedividita rigardo.**

1. Sinjoro, mi konsentas kun Vi, ke tiuj, kiuj havas puran koron, estas benitaj (Mat 5,3-8).
2. Sinjoro, mi konsentas, ke estas neeble samtempe ami Dion kaj Mamonon, kaj pro tio mi volas mortigi mian karnan aspiron kaj min deteni de kompilado de la trezoraĵoj de la tero, sed mi direktos mian rigardon al la trezoraĵoj de la ĉielo, por ke tie, kie mia trezoraĵo estas, ankaŭ mia koro estos (Mat 6,19-24).
3. Sinjoro, mi konsentas, ke la homo kun dividita pensado sur ĉiuj siaj vojoj estas neinsista. Tia prefere ne kredu, ke li povas de Vi ion ajn akiri, ja li por Vi estas skandalo. Dum li kiel la ondoj de la maro estas, la vento lin pelas tien kaj tien (Jak 1,5-12).
4. Sinjoro, mi konsentas, ke se mi la mondon amas, la amo de la Patro en mi ne estas; ja ĉio, kio en la mondo estas – la pasio de la karno kaj la pasio de la okuloj kaj la diboĉa vivo – ne estas de la Patro, sed de la mondo, kiu forpasos. Mi konsentas, ke nur tiuj, kiuj Vian volon plenumas, por eternoj restas (1 Joh 2,5-12).
5. Sinjoro, mi konsentas kaj volas kun la psalmisto la samon fari preĝante: „Montru al mi, ho Eternulo, Vian vojon, por ke mi iru en Via vero; dediĉu mian koron al la respekto de Via nomo“ (Psa 86,11).

**Sinjoro, mi konsentas kun Vi koncerne la devligan naturon de la tag-taga iro.**

1. Sinjoro, mi konsentas, ke la vera kialo de mia malsukceso ĉi tie en la pasinto estis manko de amo por Vi, kaj se mi tion argumentas per manko de tempo, mi faras el mi mensogulon, ja mi tag-tage havas precize la saman tempon je dispono kiel ĉiu alia homo, nun vivanta, kaj troviĝas difinita tempo por ĉiuj aferoj (Pre 3,1-9).
2. Sinjoro, mi konsentas pri la nepro de tagtaga adorado de Vi mem, ja en Vi mi vivas kaj moviĝas kaj mian sencon havas (Psa 5,2, 92,1-2, 145,2; Dan 6,10; Ago 17,28; Heb 13,15).

3. Sinjoro, mi konsentas pri la plilongigitaj tempoj de persona preĝado, kiel ankaŭ pri lernado, kiel oni preĝu senĉese (1 Kro 16,11; Luk 6,12, 18,1; Ago 6,4; Rom 12,12; Kol 4,2).

4. Sinjoro, mi konsentas pri la regula studado de la Biblio kaj pri la profundiĝa legado de Via vorto, por ke mi povu plaĉi en Viaj okuloj kaj ke mi estu provizita per ĉio por la dieca vivo en tiu ĉi sendia mondo (Psa 119; Jer 15,16; Joh 5,39, 20,31; Ago 17,11; Rom 15,4; 2 Tim. 2,15, 3,16).

5. Sinjoro, mi konsentas, ke estas malfacile evoluigi bonajn kutimojn kaj ke oni ilin facile misatentas, tial oni konstante bezonas Vian efikan helpon por povi fundamenti la tag-tagan iradon kun Vi kaj en tio insisti (Rom 6,4, 8,1-4; Gal 5,25).

**Sinjoro, mi konsentas kun Vi, ke mia bezono estas, esti parto de la preĝanta, prizorga komunumo.**

1. Sinjoro, mi konsentas, ke la regula aŭskultado de via predikata kaj instruata vorto estas nepra kaj mi klopodas respekti la tagon de la Sinjoro en fidelo (Psa 55,14; Jes 56,2; Efe 2,10, 5,8, 15).

2. Sinjoro, mi konsentas, ke mi por reteni mian propran fajron de sindisponigo kaj de pureco bezonas la helpon de la gefratoj kaj mi nepre min engaĝas por esti viva parto de la rekoneble kristana komunumo (Ago 2,41-41; Gal 6,2; 2 Kor 8,2; Efe 2,19; Heb 3,13-14).

3. Sinjoro, mi konsentas, esti aliĝinta al iu preĝgrupo kiu regule kunvenas, por enkadre de la komunumo preĝi unu por la alia kaj por la revekiĝo; kaj se mi tian jam ekzistantan grupon ne povas trovi, mi volas fari ĉion en mia povo, por tian grupon iniciati (2 Kro 7,14; Psa 80; Mat 18,20; 1 Tes 5,17; 1 Tim 2,8).

4. Sinjoro, mi konsentas pri la travidebla honesto en rilato kun miaj gefratoj en la Sinjoro; ke tiel ili min laŭ ĝusta maniero stimulu, konsolu, admonu kaj povu esti al mi helpemaj en ĉiuj aferoj, kiuj Vian regnon rilatas (Psa 32,2; Rom 12.9; 2 Kor 4,2; Gal 6,2; Efe 4,25; Heb 3,13-14).

**Sinjoro, mi konsentas kun Vi, ke mia tasko estas, mian lumon lasi brili antaŭ la homoj kaj esti la salo de la tero.**

1. Sinjoro, mi konsentas, ke tio signifas esti rilate al aliaj plene malfermita en sia konfeso al Vi kaj en mia kristana irado (Luk 12,8; Ago 4,20, 22,15; Rom 10,9; 1 Joh 4,15).
2. Sinjoro, mi konsentas, ke ĉio-ĉi, kion mi diras kaj faras, postulas moralan honeston – kaj samtiel elsarkon de iu ajn hipokritaĵo en mia vivo. Mi deziras por mi esti kiel Natanaelo, pri kiu vi diris, ke li estas vera Izraelido, en kiu ne troviĝas ruzeco (Joh 1,47; Kol 3,23).
3. Sinjoro, mi konsentas, ke tio ĉi kun tiuj, kiuj estas sen Kristo, postulas kuraĝan konfrontiĝon pri lia postulo rilate ilian vivon kaj ke mi devas esti preta en ĝusta tempo aŭ en malkonvena tempo ilin admoni kaj averti (Jes 41,10; Ago. 4,31; Fil 1,28; 2 Tim 4,1-2).
4. Sinjoro, mi konsentas, ke tio signifas obstinon kaj ke mi ne devas kapitulaci aŭ malstabiliĝi, se la cirkonstancoj iĝus malmolaj, ankaŭ ne, se mia laborloko aŭ mia sekureco estas minacataj – aŭ se miaj enspezoj aŭ la nombro de miaj amikoj malkreskas (Ago 4,13-21, 20,23-24; Gal 6,9; Fil 1,27; 1 Tes 5,21).
5. Sinjoro, mi konsentas, ke tio ĉi min faras vundebla kaj postulas de mi fari la samon kiel Kristo, disponigi mian vivon por la aliaj (Joh 10,14-18; Luk 9,23, 14,26; Joh 3,30, 12,25; Rom 15,1; 1 Joh 3,16). Per Via graco tamen mi volas kontraŭstari la koruptecon de tiu ĉi mondo, estante la salo, kaj mi volas kolporti la veron, estante la lumo (Mat 5,13-16).

**Sinjoro, mi konsentas kun Vi pri la rangŝtupo de la amo en mia vivo.**

1. Sinjoro, mi konsentas rilate Vian unuan grandan ordonon, kiu de mi postulas ami Vin el mia tuta koro, tuta animo, per la tuta forto kaj per la tuta menso (Mat 22,37-38), kaj ke mia amo por Vi estos pruvita per mia obeo al Viaj ordonoj (Joh 14,23; 15,9-14; 1 Joh 2,3-5).
2. Sinjoro, mi konsentas rilate Vian duan grandan ordonon, kiu de mi postulas ami mian proksimulon kiel min mem (Mat 23,39), kaj ke mia amo al la aliaj estas la provo de mia amo al Vi (1 Joh 4,20-21).

3. Sinjoro, mi konsentas, ke Vi estas la fonto de la amo (1 Joh 4,7-19), kaj ke ĉiuj karakterizaĵoj, markantaj la mankon de la amo ĉe mi estas la karakterizaĵoj de la forlaso de mia rilato al Vi (1Joh 2,9-11; 3,14; 4,7-12).

**Sinjoro, mi konsentas kun Vi koncerne la fakton, kiu havos la kulpon por ĉiuj miaj pasintaj, nuntempaj kaj estontaj pekoj kaj misagoj.**


1. Sinjoro, mi konsentas, ke mi ĉesos la praktikon de destruktiva memkritiko. Mi akceptas la fakton, ke mi estas nova kreitaĵo en Kristo Jesuo (2 Kor 5,17) kaj ke mi povas ĉion fari per Jesuo Kristo, kiu min faris forta (Fil 4,13).
2. Sinjoro, mi konsentas, ke Kristo pagis la punon por miaj pekoj kaj ke mi ne havas rajton puni min mem por la pekoj, kiujn Kristo pagis. Mi konfesas esti laca pro portado de la pezo de la kulpo el tiuj pekoj kun mi, kaj tial mi volas min nun apogi sur Vin, ja Vi ilin por ĉiam forportis (Jes 53,5; 1 Pet 2.24; 1 Joh 1,7).
3. Sinjoro, mi konsentas koncerne rapidan konfeson de ĉiu peko, kiu en estonto aperos kaj mi tuj post mia konfeso akceptos Vian pardonon kaj purigon kaj mi neniam plu min ŝarĝos per la pezo de tio, kion Vi jam forigis (1 Joh 1,9).
4. Sinjoro, mi konsentas, ke mi rajtas vivi venke en la lumo de ĉio, kion Vi por mi faris (Rom 8,35-39; 1 Kor 15,57; 2 Kor 2,14) per la fido je la Sinjoro Jesuo Kristo, kiu min amis kaj min per sia sango elaĉetis (1 Petr 1,18-19).

*Tradukita el la angla: „LORD, I Agree“ kun la permeso de la aŭtoro Richard Owen Roberts. Germanigis: Gisela Whitaker, mallongigis kaj redaktis: Lothar Gassmann; esperantigis V.O.*

# Publika vorto pri la pribapta prediko en la evangelia (luterana) eklezio

*De paroĥestro Wilhelm Busch*
*(El la jaro 1956, Licht und Leben)*

*Rimarko de la redaktaro: Estas vekige kaj nekredeble, kion la konata junulara paroĥestro el Essen kaj evangeliisto Wilhelm Busch (konata pro sia plej sukcesa libro* **Jesus unser Schicksal** *– Jesuo nia destino) jam antaŭ 60 jaroj skribis pri la vaste disvastigita kontraŭbiblia prediko pri la bapto kaj pri la baptopraktiko ene de la luterana evangelia eklezio. Eĉ se li persone insistis ĉe la baptado de beboj (kion ni vidas alie), tamen li per klaraj vortoj agumentas kontraŭ la falsa kompreno kaj misuzo. Pro tio ni publicas tiun lian kontribuon denove. Lia libro* **Jesuo nia destino** *troviĝas ankau en esperanta traduko sub la adreso: www.kristana-misio-en-esperanto.si.*



**Ni protestas! Ni levas voĉon de objêto!**

Ni ne povas plu silenti pri tio, ke en la evangelia eklezio oni parolas pri la bapto laŭ la maniero, kiu dekadencis ĝis la terura minaco por la ne jam konvertiĝintaj homaj animoj.

Jen ie ajn dum la diservo okazas bapto. Ĉirkaŭ la baptokuva ŝtono antaŭ la kunveninta komunumo staras la gepatroj kaj la baptopatro aŭ baptopatrino. Temas pri la homoj, kiujn oni dum jaroj en la preĝejo ne vidis. La ordonoj de Dio por ili estas plene senligaj. Ili neniam demandis pri la savo en Jesuo Kristo. Sed nun ili kunportas sian infanon por ĝin bapti. Kaj fine de la bapta ceremonio la paroĥestro metas sur ĝin sian manon dirante: „Enkorpigita en la korpon de Kristo! – Sigelita! – Savita!“ Tiel okazis en iu urbo, kies nomon mi ĉi tie ne volas mencii.

Mi min demandas: Kio okazas en la koroj de la gepatroj kaj de la baptogepatroj? Probable ilia konscienco por unu momento estis maltrankvila, kiam ili enpaŝis la preĝejon kaj pensis pri tio, kiel fortaj malestimantoj de la evangelio ili estas. Sed nun ili tamen aŭdis, ke ili per sia bapto „en la korpon de Kristo estas enkorpigitaj“, ili estas sigelitaj kaj savitaj. **Nun ili iras trankviligitaj hejmen kaj prenas la botelon de brando por bone festi la bapton**.

Ie mi okazigas evangelizadon. Mi avertas la homojn antaŭ la eterna pereo, mi petas ilin, fari la paŝon el la mallumo en la lumon. Post tio mi estas serĉata de iu

ĉagrenita paroĥestro. „Kiel vi povas tiamaniere paroli, kvazaŭ tiuj ĉi homoj troviĝus en danĝero por eterno perei?“

Mi respondas: „En tiu danĝero ili troviĝas! Ĉu ni plu ne scias, ke ni devas la homojn averti en la nomo de Tiu, kiu diris: ‚Timu antaŭ tiu, kiu povas pereigi kaj la korpon kaj la animon en la inferon!’ Ĉu ne ankaŭ Petro dum la pentekosta tago diris al la homamaso: ‚Lasu vin savi el tiu ĉi misa generacio’?“

Je tio la paroĥestro respondas: „La homoj, al kiuj Petro tiel parolis, ne estis baptitaj. Niaj aŭskultantoj de la prediko estas baptitaj.“

Dum la sennombraj predikoj la komunumo ricevas certigon: „Vi povas havi sekurecon de via savo, ja vi estas baptitaj. Forlsu do ĉiujn dubojn kaj ĉiujn konsciencriproĉojn rigardante al via bapto!“

En la bulteno „Nachrichten aus der Bethel-Mission“ (La raportoj el la misio de Bethel) de Julio/Aŭgusto 1956 Gerhard Jasper rakontas pri konfrontiĝo kun la misinstruitaj indiĝenoj en Orienta Afriko. Tie oni povas legi la frazon: „La bapto? Jes, ĝi faras nin por la infanoj de Dio.“

Sed en mia Biblio estas skribite: „Ni nun estas la infanoj de Dio per la fido…“

**El la fido je la Sinjoro Jesuo Kristo pli kaj pli fariĝas la kredo en la bapton.**

Nun, oni instruas la ne jam konvertiĝintajn pekulojn: „Via bapto estas la enkorpigo en la korpon de Jesuo Kristo. Via bapto estas la novnaskiĝo. Vi estas la propraĵo de Jesuo Kristo, ĉar vi estas baptitaj.“

La apostoloj tiel ne predikis. Ili diris: „Ni admonas substitue de Kristo: Lasu vin repacigi kun Dio!“ Ili aklamis: „Lasu vin savi el tiu ĉi misa generacio!“

Tia prediko provokas kontraŭstaron, sed ankaŭ elvokas la spiritan vivon. Tie, kie oni avertas la pekulojn antaŭ la pereo kaj ilin alvokas kapti la senpagan gracon de Dio per la fido en Jesuon, tie estiĝas la spirita vivo.

Sed kiel malofta okazo tio ĉi niatage estiĝis ene de la evangelia eklezio! Super ĉio kuŝas terura lamiĝo. Kiel mizera estas la frekventado de la preĝejo! Kiel senvivaj estas la diservoj! Kiel povra la studado de la Biblio! Se la maljunaj avinoj ne estus savintaj la situacion, neniu homo plu ĉeestus.

Kaj kiel spasmaj estas ĉiuj provoj, helpi la eklezion por alimaniere trovi al la vivo. Oni eksperimentas per liturgio, novaj kantlibroj estas elprovataj. Oni diskutas pri ĉio, kio en la mondo troviĝas, organizitaj estas danckursoj kaj filmkluboj. Sed ĉio-ĉi tamen ne povas vualkovri, ke „en la poto sidas morto“.

Kaj tion oni povas atribui pliparte al la detrua baptoinstruo! Marx foje diris:

„Religio estas la opiumo por la popolo.“[1] **Nun, tiu ĉi baptoinstruo certe estas la opiumo por la popolo! Se tamen iu ajn homo atingus la konsciencriproĉon – se iu ajn homo atingus la penson, ke li devas konvertiĝi kiel la perdita filo – se iam ajn la Spirito de Dio unu koron vekus – tiam tia homo estus tuj narkotizita per la mesaĝo: Ja vi estas baptita**. Ĉio estas bona. Kaj jen, la maltrankviliĝinta konscienco trankviliĝas denove, ja „la pastoro certe devas scii“. Mi havas konvinkon pri tio, ke sub tiu ĉi baptopraktiko estas metita la fundamento por la lamigo de la evangelia eklezio.

### Du korskuaj rakontetoj

La predikantoj de tiu ĉi korupta bapta doktrino ĉirkaŭiras kun du korskuaj rakontetoj, kiujn oni ĉiam denove povas aŭdi. Baldaŭ troviĝos plu neniu nova kandidato de la teologio, kiu dum siaj unuaj tri predikoj tiujn du rakontetojn ne estus prezentintaj.

La unua rakonteto parolas pri Lutero. Li iam dum unu el siaj fortaj provokitecoj laŭdire diris: „Baptizatus sum! – Mi estas baptita! Kiomfoje mi pri la nebiblia traktado de la bapto en la evangeliaj rondoj diris, tiu ĉi rakonteto estis al mi dirita. Malantaŭ tio troviĝis la minaco: „Vi espereble ne volas diri ion kontraŭ Lutero!“

Nun mi serioze havas konvinkon, ke Lutero ne troviĝas inter la apostoloj. Kaj aldone mia konvinko estas: Se Lutero antaŭsentus, kio el tiu lia vorto estiĝos, li esprimus sin pli klare kaj li la provokon de la diablo refutus kun la vortoj: „Jesuo mortis por mi!“ Aŭ: „Mi estas elaĉetita!“

En tiu ĉi kazo mi volas diri kun Lutero: „Bonvolu min obĵeti per la Biblio kaj ne per la ekleziaj patroj!“ Ni petas ĉiujn kandidatojn de la teologio, finfine tiun ĉi rakonteton elimini el sia programo.

La dua kortuŝa rakonto venas de la benita baltlanda paroĥestro Traugott Hann. Okaze li vizitis mortintan homon, kiu troviĝis en forta elprovado. Li trankviliĝis nur, kiam Traugott Hahn al li klarigis: „Vi tamen estas baptita!“

Nun, mi bone konis la oldan Traugott Hahn kaj mi scias, ke li estis atestanto por Kristo. Kial oni pri li scias nenion alian krom tiun ĉi anekdoton, kiu certe ne estis lia plej bona formulado? Mi trovus pli ĝusta, se li al la malsanulo estus dirinta: „Jesuo mortis por vi!“ Ja en la Biblio troviĝas skribite: „La sango de Jesuo Kristo, la Filo de Dio, faras nin puraj de ĉiuj pekoj.“ Nenie tamen mi legis: „La bapto faras nin puraj de ĉiuj pekoj.“

---

[1] W. Busch ĉi tie eraras. Tion diris Lenin, sed Marx diris: La religio estas la opiumo de la popolo. La diferenco estas esenca, ja Marx asertis, ke la popolo mem serĉas por si la opiumon, dum Lenin asertis, ke temas pri komploto de la sacerdotaro kontraŭ la popolo – rim. de V.O.

## Pri kio tute ne temas

Ne temas pri konfrontiĝo, ĉu la baptado de la infanoj, ĉu la baptado „surbaze de la fido“ kiel ĉe la baptistoj estas ĝusta. Pri tio oni certe multon povus diri. Sed nun ne temas pri tio. Se miaj baptistaj fratoj opinias, ke ili el ĉi tiu artikolo povus depreni akvon por sia muelilo, do mi al ili respondas: Ankaŭ ĉe vi temas pri la troiga percepto de la bapto, same nebiblia! Ĉi tie temas pri tio, ke ni alprenu distancon, senrigarde, ĉu ili nin renkontas sub la luterana aŭ baptisma vesto.

## Kion do la Biblio diras?

Se la bapto vere estus la „enkorpigo en la korpon de Kristo“, la „novnaskiĝo“ ktp., tiam oni devus la apostolon Paŭlon energie admoni. Ĉar en la unua ĉapitro de la unua epistolo al la Korintanoj li parolas pri la bapto laŭ la maniero, kiu al ĉiu eklezia baptisto (aŭ la baptisma luterano) devus ties harojn hirtigi. Tie Paŭlo diras: „Mi dankas Dion, ke mi baptis neniun el vi krom…“ Kaj poste li mencias kelkajn homojn, kiujn li baptis. Kaj aldone li diras: „krom tio mi ne scias, ĉu mi baptis iun alian. Ĉar Kristo sendis min, ne por bapti, sed por prediki la evangelion…“

La sagacaj teologoj elprenis diversajn citaĵojn el la epistoloj de Paŭlo por pruvi la novnaskiĝon pere de la bapto. Nun, se Paŭlo estus kredinta, ke oni iĝas novnaskita pere de la bapto, tiam li neniel povus skribi la supre menciitan aserton. Cetere estus perforto de la tiel ofte cititaj bibliaj tekstlokoj, se oni el ili konkludus la novnaskiĝon pere de la bebobaptado.

Kio do estas la bapto laŭ la kompreno de la Skribaĵo? Antaŭ ĉio ni volas apostrofi la frazon: La bapto ne donas pli ol la vorto de Dio ankaŭ donas. **Kiu asertas, ke la bapto donas pli ol la vorto de Dio, tiu okupiĝas pri magio, sed ne plu pri la evangelio**.

La vorto de Dio diras: Kiam infano estas naskita en la mondo, tiam super ĝi staras la fakto, ke Jesuo Kristo, la Filo de Dio, por tiu infano mortis. Kaj precize la samo estas dum la baptado (*biblie korekte estus diri: benado – red.*) dirite al la infano. Vere ne estas tiel, ke la evangelio anoncus: ‚Jesuo mortis por vi’ kaj ke pere de la bapto la infano nun estus inokulita en tiun gracon. Ne, tiel la afero ne statas! Sed la bapto garantias – kiel la vorto de Dio: ‚Jesuo mortis por vi’. Kion la homo per tiu mesaĝo poste faras, estas alia demando.

Bonvolu ni finfine ĉesi kun tiuj superstiĉaj imagoj, kvazaŭ ene de la infano okazus ajna mistera proceso per la bapto! Mi opinias, ke estus bele kaj pli ol sufiĉe diri al tiu infano: „Jesuo mortis por vi!“ La prediko de la eklezio tamen devus vo-

ki la baptitajn kaj la nebaptitajn, por ke ili venu el la mallumo en la lumon.

### La mizera helpilo

La homoj, kiuj tiun nebiblian instruon disvastigas, cetere ankaŭ ne fartas bone konfronte al tiu ĉi afero. Kun malmultaj esceptoj la homoj de niaj grandurboj estas baptitaj. Kaj nun rigardu ni ilian spiritan vivon! Kiel malgranda estas la nombro de veraj kristanoj! Ĉiuj-ĉi centmiloj dum jaroj aŭdas neniun Dian vorton, devus esti la homoj, kiuj estas enkorpigitaj en Kriston, ĉu ili do devus ĉiuj esti la novnaskitaj homoj?

Kaj oni trovis mizeran helpilon. Oni diras: „Ili defalis el la bapta graco.“ Aŭ oni diras kiel Gerhard Jasper jun. en la supre menciita artikolo: „Ili egalas la perditan filon, kiu la domon de sia patro forlasis. Sed la bapto pro tio ne estis vana, ja ankaŭ la perdita filo restas la filo. Nur, li estas duoble kulpa, ĉar li la gracon de Dio ne alprenis, kvankam ĝi por li estas preta. Kaj la konvertiĝo? Ĝi estas nenio krom la retrovo kaj la realpreno de la Dia graco, kiu las homon jam okaze de ties bapto estis donita, kiam tiu homo estis ‚entombigita kun Kristo'.“

### Mia menso obĵetas

Oni klarigas: „La bapto estas la novnaskiĝo kaj la enkorpigo en la korpon de Kristo.“ Se tio estus vera (tio ne estas vera!), tiam ne nur mi, sed ĉiu libera homo devus laŭte obĵeti kontraŭ tio, ke oni nin kiel neresponseblan infanon perfortis tiel nekredeble. Se la bapto havus tiel ŝanĝipovan signifon, tiam estas perforto super la homoj, se oni super ili tian ŝanĝon efikigas antaŭ ol tiu povus pensi kaj havi pri la afero propran opinion.

Mi ripetas. Troviĝas fakto, staranta antaŭ ĉio alia kaj mi ĝin ne povas eviti, nome: ke la Filo de Dio por mi mortis. Sed se mu volas pri tio alpreni starpunkton, tiam la mesaĝo pri tio unue devas esti al mi anoncita, kiel Paŭlo diras: „La fido venas el la prediko, la prediko el la vorto de Dio.“ Tamen estus miyuzo kun mi, se oni min enkonstruus en la korpon de Kristo, sen doni al mi eblecon, tiun ĉi procedon alpreni en la fido aŭ ĝin en la malfido refuti. Kiu tian baptodoktrinon havas, tiu devus sekve prave kaj nepre el sia koro protesti kontraŭ ĉia infanbaptado kaj pledi por la baptado de plenkreskuloj.

Sed jen io alia:

Ni volas konstrui sekvan okazon: certa paroĥestro estas vokita al nepra bapto. Ĝis tie kondukas longa vojo. Kiam li alvenas la tramstacion, la tramo ĵus forveturis. Kaj li devas atendi sekvajn dek minutojn. Tiuj dek minutoj estas la kaŭzo, ke li alvenas tro malfrue. La infano intertempe mortis.

Oni nun ne utuligas la argumenton, ke en tia kazo la akuŝistino aŭ la gepatroj tion povus fari. Ja la plimultaj gepatroj de niaj baptkandidatoj kaj multaj niaj akuŝistinoj por tion efektivigi simple ne havas kapablon. Tiel la paroĥestro venas tro malfrue, ĉar li malfruis la tramon. Nun la infano estas perdita. Se la paroĥestro posedus aŭton, la infano estus savita.

Se iu havas nur iomete da ideo pri la evangelio, tiu scias, ke tio ne havas sencon. En la unua momento de sia vivo super la infano troviĝas la versiklo: „Jesuo mortis por vi." Kaj tio estas skribita super ĝi, ĉu baptita aŭ ne.

**La konkludaj vortoj**

**Ĉesu ni do kun certa baptoprediko, kiu malebligas iun ajn konvertiĝon, kiu kontraŭstaras ĉian evangelizadon kaj kiu ne kongruas kun la vortoj de la Skribo! Ĉesu ni kun certa baptoprediko, kiu la spiritan vivon en la evangelia eklezio en la bazo lamigas!**

Sed tiu aŭ tiu povus min kontraŭargumenti, ke mi ne scias la benon de la bapto ĝuste aprezi. Dio donacis al mi ses infanojn. Ĉiun fojon, kiam mi min klinis super la lulilon de la novnaskito, mi sentis super mi pezan ŝarĝon, ke tiu ĉi infano estis naskita en teruran kaj hororan mondon, plena da malmolo kaj tentado. Kaj mia dua penso estis: Sed tamen troviĝas la bona paŝtisto, kiu ankaŭ por tiu ĉu infano lasis sian vivon.

Kaj poste mi tiujn infanojn kun granda ĝojo prenis al la baptado, ĉar tie laŭte kaj dece kaj verdire videble tiu ĉi mesaĝo estis atestita super la infano. (*Rim. de la redaktaro: En ĉi tiu punkto Wilhelm Busch bedaŭrinde eraras, ĉar kiam la homoj prenis la infanojn al Jesuo, li ne baptis ilin, sed li ilin* ***benis****;* Mak 10,13-16)!

Je la fino mi volas mencii ankoraŭ unu atestaĵon, kiu en la kredanta komunumo havas apartan pezon. Iu el miaj konatuloj, suferanta sub certa plago, ĉar li en la preĝejo anstataŭ al la kruco de Jesuo ĉiam denove estas atentigata al la bapto, turnis sin al profesoro Karl Heim kun peto, diri al li helpipovan kaj klarigan vorton pri la afero. Karl Heim respondis lin tiamaniere:


„Mia respondo je via demando koncerne la sanktan baptadon estas tre simpla: Mi ek de ĉiam estis kontraŭanto de la tn. ‚bapta novnaskiĝo', do de la kompreno, ke per la aspergado de la baptito per akvo en la interno de la homa ido okazus konvertiĝo.

Pro tio mi ankaŭ prenas por falsa, ke la baptito helpe de la bapta akto estus enskribita en la Dian libron de la vivantaj en la ĉielo. En la Biblio troviĝas neniu spuro de tia imago, ja en la Nova Testamento nur la plenkreskuloj estas baptitaj, kiuj jam por Kristo decidiĝis"…

# Menno Simons
# kaj la „maldekstra alo“ de la reformacio“

*Elplume de predikanto Dieter Zimmer, Wilnsdorf*

*Kiu nuntempe parolas pri la reformacio, pensas pliparte pri la grandaj reformatoroj Lutero, Cvinglio kaj Kalveno kaj pri la eklezioj, kiuj de ilia faro eliris, pri la luterana kaj reformacia eklezioj. Por la laboro de tiuj viroj ni volas danki Dion! Sed ofte oni forgesas, ke apud ili troviĝis ankaŭ aliaj, kiuj same meritas esti menciitaj inter la grandaj, sed ili en la pasinto – kaj ofte ankaŭ niatempe – estis preterviditaj. Por kontraŭstari la ekzistantan malekvilibron, ni volas observi la vivon kaj la farojn de iu alia el la granduloj en la domo de Dio kaj el tio tiri kelkajn instruojn por ni mem.*



*Temas pri Menno Simons. Ankaŭ liaj faroj devus esti ĉe ni honorataj, ja ankaŭ li enviciĝas inter la homojn, pri kiuj Daniel 12,3 diras: „Kaj la klerigantoj brilos, kiel la brilo de la ĉielo; kaj la virtigantoj de multaj, kiel steloj por ĉiam kaj eterne.“*

En la daŭro de la reformacio de la 16-a jarcento certa movado kreis por si spacon, povante ĝin nomi „la maldekstra alo de la reformacio“ aŭ ankaŭ „la tria reformacio“. Parto de tiu movado engaĝis sin fervore por la baptado de la plenkreskuloj kaj tiel pro sia radikala apero sin trovis en konflikto kun la superuloj. Alia parto distingiĝis per serioza bibliostudado, preĝado, servo el amo kaj postsekvado de Jesuo Kristo. La plej grava persono de tiu dua grupo estis ĝuste Mano Simons, je kiu nuntempe referencas la en la tuta mondo disvastikataj menonitoj. Post la fino de la mondmilito en la jaro 1949 en la tuta mondo troviĝis 400.000 adeptoj. Laŭ la informoj de la menonita universala konferenco troviĝis en la jaro 2015 en la mondo pli ol du milionoj da menonitaj baptistoj.

## 1. La vivo de Menno Simons

### Ek de lia naskiĝo ĝis lia konvertiĝo

Pri la familia fono de Mennos kaj lia naskiĝo ne troviĝas multaj informeroj. Li naskiĝis en la jaro 1492 aŭ 1496 en Witmarsum en Friza lando, do ankoraŭ antaŭ

la tempo, kiam Marteno Lutero per sia fiksado de la tezoj ĉe la burgpreĝejo en Wittenberg 31-an de Oktobro 1517 la reformacion enkondukis. Pri liaj junaj jaroj oni samtiel ne scias multon. Liaj gepatroj estis kompreneble konvinkitaj katolikoj, kiuj preferis por sia filo bonan karieron. Tial ili ebligis al li bonan edukadon, kiu povus malfermi por li en estonto brilan karieron. Menno studis teologion. Kiel studento de la rom-katolika teologio li lernis la latinan lingvon kaj pri la ekleziaj patroj kaj studis la historion de la eklezio, sed li ricevis nenian instruon pri la Sankta Skribo. Kiam li en la jaro 1524 estis konsekrita por sacerdoto kaj li komencis sian unuan servon en Pingjum en Holstein, li ankoraŭ ne havis okazon legi la Biblion.

Ĝis tiu momento li estis konvinkita katoliko, kiu eĉ en sonĝoj ne havis imagon, ke li iam aliĝus al la reformacia movado. Sed estis tri okazintaĵoj, kiuj la kuron de lia vivo decide ŝanĝis.

### Dubo pri la instruo de la transsubstancio

„Dum la unua jaro de sia sacerdoteco li subite, dum li celebris meson, ricevis penson, ke la instruo pri la transsubstancio (la ŝanĝiĝo de pano kaj vino en la korpon kaj sangon de Kristo) probable ne estas vera. Menno estis pro tiu „atako de la diablo“ – tiel li klarigis al si tiun penson – profunde skuita kaj li provis tion el siaj pensoj elpeli.“[1]

Sed li de tiu penso ne plu povis liberiĝi. Konsternita kaj malsekurigita Menno serĉis helpon ĉe sia konfespatro kaj ĉe siaj estroj. Sed li helpon ne ricevis kaj tiel li restis sola kun tio, kion li lernis dum sia infana aĝo kaj kion la koncilio de Tridento 1551 poste tiel formulis (retenante validon en la katolika eklezio ĝis nia tempo!):

„Per la konsekrado de pano kaj vino okazas ŝanĝo de la tuta pansubstanco en la substancon de la korpo de Kristo, nia Sinjoro, kaj la tuta vinsubstanco en la substanco de lia sango. Kiu tion negas, ke en la sakramento de la plej sankta eŭkaristio reale, vere kaj esence estas la korpo kaj la sango kune kun la animo kaj la dieco de nia Sinjoro Jesuo Kristo kaj sekve tuta Kristo, kaj asertas, ke li estas en ĝi nur kiel signo, kiel bildo aŭ kiel efikopovo, tiu estu anatemita.“[2]

Atinginte punkton de profundo kaj plena de malesperiĝo Menno kaptis Novan Testamenton kaj komencis el ĝi legi. Je lia mirego li konstatis, ke la Nova Testamento ŝajnas ne fundamenti la rom-katolikan komprenon de sakramentoj. Poste li serĉis konsilon en la tekstoj de Lutero. En la jaro 1528 li helpe de la tekstoj de Lutero atingis konvinkon, ke forĵeti certan instruon, kiu ne havas bazon en la Skribo, ne havas kiel sekvon la poreternan morton.

## La unua grava leciono por ni en nia tempo

La rom-katolika eklezio ekskludas tiujn, kiuj konforme al la atestoj kredas la Sanktan Skribon, ke la elementoj pano kaj vino dum la celebrado de la sankta vespermanĝo ne transformiĝas en la karnon kaj sangon de Kristo. La tekstloko 1 Kor 11,24 atestas, ke dum la biblie prezentata sankta vespermanĝo temas pri la memora vespermanĝo kaj ne, kiel diras la katolika doktrino, pri la ofercelebrado. Post kiam nia Sinjoro Jesuo Kristo solene instalis la vespermanĝon, li parolas pere de la plumo de la apostolo Paŭlo ankoraŭ daŭre pri „tiu ĉi pano“ kaj pri „la kaliko“ (1 Kor 11,26-27).

Kiu nuntempe opinias, ke la ekumenaj klopodoj kaj le reiro en la sinon de la katolika eklezio devus esti subtenitaj, tiu devus scii, ke li tiamaniere estas perfidulo de sia Sinjoro! En la okazo de denova unuiĝo kun la roma eklezio li ne partoprenus plu la biblian sanktan vespermanĝon, sed katolikan ofercelebradon. Li devos adori hostion, kiu laŭdire transformiĝis en la korpon de Kristo:

„Tiel ne restas dubo, ke ĉiuj kredantoj je Kristo laŭ la maniero, jam ĉiam praktikata en la katolika eklezio, devas dediĉi honoron al tiu la plej sankta sakramento per glorado, reverenco kaj adorado, kion oni al la vera Dio ŝuldas.“[3]

Sed, tiu, kiu adoras pecon de pano, praktikas idoladon! *„Tial, miaj amataj, forsavu vin de idolservado“* (1 Kor 10,14) *„Ne trompiĝu: nek malĉastuloj, nek idolanoj, nek adultuloj, nek molmoruloj, nek viruzaĉantoj, nek ŝtelistoj, nek aviduloj, nek drinkuloj, nek insultantoj, nek rabemuloj, heredos la regnon de Dio“* (1 Kor 6,9-10). Tial: detenu viajn manojn for de la katolika mescelebrado! Detenu viajn manojn for de la provoj reunuiĝi, kiu ne okazas surbaze de la Sankta Skribo!

## La mortigo de Sikke Freerks Snijders

La jaro 1531 donis sekvan okazintaĵon, kiu Mennon Simonson en lia koro profunde skuis. Venis en liajn orelojn mesaĝo, ke certa viro Sikke Freerks Snijder, kiu lasis sin „re-bapti“, estis mortigita. Neniam antaŭe en sia vivo Menno aŭdis ion pri ia dua bapto. Ĉe li vekiĝis suspekto, ke la katolika instruo pri la bapto samtiel povus esti falsa, kiel li tion konstatis en la kazo de la komunio. Denove li prenis la Novan Testamenton kaj konsultis ankaŭ la tekstojn de la reformatoroj, sed trovis nenian kontentigan respondon, pro kio oni baptas bebojn. Kiel la roma sacerdoto li praktikis daŭre la baptadon de beboj, alprenis pekkonfeson kaj celebris mesojn. Tiel ni havas antaŭ ni viron, kiu troviĝis sur la serĉvojo por la vero. Lia serĉado tamen ne estis senfrukta!

## La morto de la frato de Mennos

„En la jaro 1535 estis lia frato en la nederlanda kaoso de la revolucieca re-baptado prenita kaj perdis sian vivon en la batalo kontraŭ la aŭtoritatoj. Lia morto movis la koron de Menno tre forte! Lia kompatinda tentita frato estis por Manns sufiĉe por esti preta morti por tio, kion li vidis vera, dum Menno la veron konis kaj ĝin tamen ne postsekvis. Kaj jen per sia konscienco turmentita sacerdoto cedis antaŭ Dio per profunda kaj serioza pento.“[4] Menno reverencis antaŭ Kristo, kon-fesis siajn pekojn kaj disponigis sian vivon plene al la Sinjoro. Tuj li ricevis cer-tecon, ke liaj pekoj estas pardonitaj kaj ke lia vivo estas purigita de ĉia kreskaĉaĵaro kaj sanktigita.

Kiel la afero aspektas, li post tio retenis ankoraŭ dum naŭ monatoj sacerdotan pozicion en espero, ke li povos sian komunumon konduki al la sama sperto, kiun li travivis. La provo, reformi sian komunumon, mistrafis. Venis la 30-a Januaro 1536, dimanĉo. Menno publike obĵetis en Witmarsum la rom-katolikan kredon, demetis sian oficon de la roma sacerdoto kaj aliĝis al la packonduta alo de la ana-bnaptisma movado.

## La dua signifoplena leciono por ni en nia tempo

La enirpordo en la biblian komunumon estas laŭ la Agoj de apostoloj 2,38 ĉiam la pento kaj la konvertiĝo al Jesuo Kristo, kaj neniam ia eklezia procedo, eĉ se bone intencita. Sekve de tio la „baptitaj idolanoj“ neniel estas kristanoj en la sen-co de la Sankta Skribo, kaj sekve ankaŭ la grandaj eklezioj ne vere estas la Ekle-zio resp. la komunumo en la biblia senco. Ĝin forlasi, kiel Menno Simons ekz. post sia konvertiĝo faris, tiel ankaŭ ne povas esti peko.

## De la konvertiĝo de Mennos ĝis lia vivofino

La pacema alo de la anabaptisma movado estis en la tempo de Mennos gvidita de Obbe Philips. Menno estis de li baptita kaj en la jaro 1537 en la nederlanda provinco Groningen nomita por presbitero. Per tiu ĉi paŝo Menno decidis elekti malmolan vivon, ja li sciis, ke la anabaptistoj ĉie estis persekutitaj kaj mortigitaj. La amo al la vero validis por li tamen pli ol lia propra vivo.

Kiel Marteno Lutero ankaŭ li baldaŭ edziniĝis post sia konvertiĝo. Lia edzino nomiĝis Gertrud. Ili havis multajn infanojn. Dum 20 jaroj Menno kaj Gertrud vi-vis en geedzeco, ĝis la morto ŝin de li forprenis.

Ek de sia konvertiĝo evoluis Menno riĉan predikan agadon, kiu pliparte okazis dumnokte. La kunvenoj devis okazi en sekreto, ĉar la anabaptistoj konstante estis persekutitaj kaj publika, libera prediko ofte ne estis ebla. Unue ŝajnis, ke Menno

dum sep jaroj laboris en Holando. Poste li translokiĝis al alia laborloko al norda Germanio, aparte al la Rejna lando. Ek de la jaro 1546 li estis trovebla denove en Holstein. La lastajn jarojn de sia vivo li trapasis en Wüstenfelde, situanta inter Hmburg kaj Lübeck. Dum 25 jaroj li agadis sub nepriskribeblaj penadoj kaj kun nelaciĝebla pacienco parolanta kaj verkanta en Norda Germanio, Frisa lando, Livlando. Li volis havi komunumon, kiu estus pura kaj senriproĉa kaj sen provoko por tiuj, kiuj staris ekster ĝi. ‚Komunumo sen eksigado' li diris, ‚estas kiel urbo sen defendomuro, kiel agro sen kanalo kaj barilo, kiel domo sen muroj kaj pordo.'"[5]

En Januaro 1561 Menno serioze malsaniĝis. Kiam alvenis la 25-a datreveno de lia forturniĝo disde la rom-katolika eklezio, li en sia malsanula lito ankoraŭfoje leviĝis kaj avertis la ĉirkaŭ li kolektiĝintajn. Tagon poste, la 31-an de Januaro 1561 li foriris hejmen al sia Sinjoro, kiun li tiom longe povis servi.

Niatempe ŝajnas kvazaŭ miraklo, ke Menno konfronte al la daŭraj persekutoj de la anabaptistoj mortis naturan morton. Per lia servo li fariĝis unu el la plej gravaj gvidantoj de la anabaptismo. Pro tio liaj samkredanoj pli poste estis nomitaj „menonitoj". Tiun ĉi nomon ili portas ĝis nia tempo. „La silenta, pieca stilo de la menonitoj jam en la jaro 1572 en Holando kaj poste ankaŭ en Germanio (Hamburg, Emden, Danzig, Elbing, Pfalz) kaj pli poste ankaŭ en Svisujo por ili atribuis nomon de pacienco kaj religia libero … kompleta kolekto de la verkoj de Mennos en la malsupragermana (platdiĉa) dialekto skribitaj, tamen tradukitaj en la holandan, aperis en la jaro 1646 en Amsterdamo."[6]

## 2. La instruo de Mennos

### La fido, fundamentita en la Skribo

Menno Simons ne estis la fondinto de la anabaptisma movado. Kiam li konvertiĝis, li nur aliĝis al tiu movado. La anabaptisma movado jam havis sian instruan opinion, kiun ankaŭ Menno transprenis. Tamen li eksigis radikalulojn kaj tiel decide influis la paceman alon de la movado. Lia influo ne estas pretervidebla. Elĉerpa prezento de la anabaptisma dogmaro transirus la kadron de tiu ĉi artikolo. Pro tio volas ni nur prezenti la plej gravajn punktojn.

Tiel li komencis dum la iro de la jaroj evolui viglan verkadan agadon, por povi emanigi al la kredantoj ion konkretan, el kio ili povus lerni, kion kaj pro kio ili ion kredas kaj por defendi la kredon de la anabaptistoj eksteren. En la jaroj 1539 ĝis 1540 aperis la plej grava libro de Mennos: lia fundamento de la kristana instruo, malonge nomita *Fundamentbuch*. Post la unua eldono en la jaro 1554 sekvis la prilaborita versio en la platdiĉa lingvo, en 1558 prilaborita holanda el-

dono. Por la anabaptistoj en la Suda Germanio kaj en Svisujo aperis la libro en la altgermana traduko unue en la jaro 1575. Tiu ĉi libro pli poste estis inkluzivita en la kolektitajn verkojn de Menno Simons. Menno tiris siajn argumentojn el la Sankta Skribo kaj cetere validigis nenian aŭtoritaton. Li estis viro, kies konscienco estis ligita al la Skribo.

### La vespermanĝo de la Sinjoro kiel signo

Apud alio Menno skribis ankaŭ pri la vespermanĝo de la Sinjoro. Li estis maltrankvila pro la fakto, ke en la kristana tendaro oni kverelas pri kiel kaj kio dum la vespermanĝo de la Sinjoro kaj tamen forgesas, kial la signo estis starigita kaj al kio ĝi indikas. La vespermanĝo estas la signo kaj indikas al Kristo, li diras. La pano kaj la vino simbolas la korpon kaj la sangon de Kristo. La pano ja ne povas esti la korpo de Kristo kaj la vino ne la sango de Kristo, ĉar Kristo kun sia korpo iris en la ĉielon kaj nun tie estas kun sia korpo vivanta. Se ni ĉi tie sur la tero festas la vespermanĝon de la Sinjoro, ni tiel anoncas la amon de Kristo, kiu subiris al ni kaj nin savis. La vespermanĝo de la Sinjoro apud tio estas ankaŭ la signo de la kristana unueco, kristana amo kaj de la kristana paco Pro tio ĝi ankaŭ estis starigita nur por la kredantoj: „Ĝi devas esti proponita kaj prenita kun rompiĝinta koro, vera pento, humiliĝinta spirito … kun paco kaj ĝojo en la Sankta Spirito.“[7]

Vere kredantaj homoj starigas sian esperon je la sur kruco farita savfaro kaj ne je tio, kio laŭdire okazas ĉe la eŭkaristia procedo. La katolika mesofero finfine estas negado de la repaciga sufero kaj morto de Jesuo Kristo. La kredanto manĝu la karnon de Kristo kaj trinku la sangon de Kristo ne per buŝo, sed per sia kredo pere de la Sankta Spirito.

### La libera komunumo

Ĉi tie la sinteno de Mennos pri la koncepto de la eklezio. Por li la eklezio povas konsisti nur el la kredantoj, kiuj propravole aliĝas al la loka komunumo. El tia kompreno Menno obĵetis ĉian intermiksiĝon de la aŭtoritatoj kaj de la ŝtato en la aferojn de la eklezio.

Tiu instruo fariĝis en Eŭropo, en kiu dum jarcentoj troviĝis alianco inter la eklezio kaj la ŝtato, estis observita kiel herezaĵo, ja tiamaniere la anabaptistoj misatentis, kiel oni opiniis, la sanktan interligon de la eklezio kaj la ŝtato, kiu naskiĝis en la tempo de la edikto de Teodozio la Granda kaj Gratiano en la jaro 380 p.Kr. Tia herezaĵo devis, en la okuloj de la ŝtata eklezio, esti punita per morto. Menno kaj la anabaptistoj tamen insistis ĉe la punkto, ke la Nova Testamento instruas liberan komunumon kaj ke la komunumoj de la novtestamenta erao estis liberaj.

Ili akiris nenian rekonon fare de la ŝtato kaj ne vokis la aŭtoritatojn je helpo por validigi la veran kredon kaj ĝin garantii per leĝo kaj ne punis alikredantajn per martirado.

Almenaŭ en la jaro 1527 oni faris firman decidon, la anabaptisman movadon elsarki per ĉiuj eblaj rimedoj. Bedaŭrinde ankaŭ la reformatoroj konsentis kun la persekutado de la anabaptistoj. „Dum la sangverŝado en la sekva jarcenta kvarono estis mortigitaj miloj da anabaptistoj – en la katolikaj regionoj per fajro, en la protestantaj per dronigo kaj per glavo.“[8]

Spite al tiu plej terura persekutado la plimulto da anabaptistoj restis fidela al la instruo de la Biblio. En 1539 Menno skribis en sia libreto: *Kial mi ne ĉesas instrui kaj skribi*:

„Tiuj ĉi ne estas vere la ĝustaj komunumoj de Kristo, kiuj nur fanfaronas per lia nomo. Sed lian komunumon konsistas tiuj, kiuj estis vere konvertitaj, naskitaj de supre el Dio kaj en sia koro kaj menso renovigitaj, kiuj la potencon de la Sankta Spirito, el aŭdado de la Dia vorto, iĝis infanoj de Dio kaj al Li obeemaj, kiuj dum sia tuta vivo aŭ ek de la tempo de ilia vokiteco vivas senriproĉe en Liaj ordonoj kaj laŭ Lia mizerikorda volo.“[9]

### La tria grava leciono por ni niatempe

Se la komunuma movdo, kiu ek de la 18-a kaj 19-a jarcentoj kreskis, restis en la pasinto ĉe la starigita ŝtata eklezio, tio estas per certa aspekto kaj en la lumo de la faktoj komprenebla, ja en Germanio ĝis la jaro 1918 troviĝis nenia religia libero. La religia libero en tiu ĉi lando estas ankoraŭ tre juna planto. Ĝis la jaro 1818 devis ĉiu, kiu ne moviĝis en la kadro de la leĝe starigita eklezio, kalkuli per verŝajno ricevi punon aŭ eĉ perdi sian domon kaj bienon. Home rigardate oni povas kompreni, ke oni en la luterana kaj reformacia instruo serĉis komunajn trajtojn kaj poste tiujn emfazis, por tiel signali, ke oni estas „linifidela“.

Sed ĝuste la historio de la menonitoj pruvas al ni impresige, ke tra jarcentoj ĉiam denove troviĝis komunumoj, kiuj spite al la plej fortaj persekutadoj firme fidelis je la biblia modelo pri la komunumo kaj tiun ankaŭ konsideris en sia praktiko. Ke tiuj komunumoj en Mezeŭropo dum la pasintaj tri jarcentoj estis tiel maloftaj, tio estas klarigebla per tio, ke la plimulto da ili pro la persekutado elmigris al la Norda kaj Suda Ameriko.

Estas honto por ni hodiaŭ en la regiono Gnadaus, ke ni ne havas plu amon al la Dia vorto kaj opinias, ke la provincekleziaj kaj liberekleziaj komunumoj havas ĉiuj la saman rigardon al la Biblio. Leviĝas suspekto, ke almenaŭ ĉe la gvidantaj fratoj, kiuj la biblian veron fakte koni devus, la mallarĝa pordo estas plilarĝigata por tiel krei spacon ankaŭ tie, kie tion ne konfirmas la Sankta Skribo. **En la tem-**

**po, en kiu vere troviĝas religia libero, ne devus troviĝi bazo por konduki la homojn al konvertiĝo kontraŭe al la biblia modelo, laŭ kiu oni kolektiĝas en liberaj komunumoj, gvidataj ekskluzive per propraj presbiteroj!**

Al la klasikaj liberaj eklezioj kiel baptistoj kaj liberaj evangeliaj komunumoj, kiuj tamen provas validigi en la praktiko la biblian modelon de komunumo, ni devas ĉi tie alvoki jenon: **Tenu, kion vi havas! Vi estas ĉiuj laŭ tiu aŭ alia maniero ligataj al la ekumenisma movado kaj vi marŝas kune kun la grandaj eklezioj en la direkto al Romo. En la kazo de reunuiĝo kun la tn. „patrina" eklezio vi perdos ĉion, kion viaj patroj trasuferis kaj perbatalis.**

Se la ekumenisma vojo plu tiel estos marŝata kiel ĝis nun, la reformacio baldaŭ estos plene perfidita kaj nia Sinjoro plene negita! Tial validas ankaŭ por ni niatempe, kion la Sinjoro iam alvokis al la komunumo en Filadelfio: *„Tenadu tion, kion vi havas, por ke neniu forprenu vian kronon"* (Apo 3,11). Samtiel validas la indiko pri la falsaj spiritaj kaj ekleziaj sistemoj: *„Tial eliru el inter ili, kaj estu apartaj, diras la Eternulo, kaj ne tuŝu malpuraĵon"* (2 Kor 6,17).

### La pacifismo

Menno Simons en ĉio, kion li instruis, havis antaŭ siaj okuloj Kriston, kiel li aperas en la Nova Testamento. La Prediko sur la monto kaj la tie dirata alvoko por la amo kaj sindispona sufero kaj morto de Jesuo sur la kruco difinas lian sintenon ĉe la demando pri la uzo de violento. Pro tio li malakceptis ĉian uzon de violento. Per tio li distingiĝis plej forte de la tradicia kristana etiko. Kompreneble ĉiuj anabaptistoj lin postsekvis en tiu ĉi punkto, se oni elprenas la Regnon de la anabaptistoj en Münster, kiuj helpe de la armiloj defendis la urbon kontraŭ la sieĝintaj armeoj.

El tiu ĉi fervorego, fariĝi pli kaj pli simila al Kristo, elkreskis ankaj la rifuzo partopreni ĉe la registaraj aferoj kaj ĉe la militservo ĉe Mennos kaj liaj sekvantoj. La anabaptistoj estis prefere pretaj morti ol mem mortigi. El tio klariĝas ankaŭ, kial la ŝtataj kaj ekleziaj aŭtoritatoj en ĉiuj partoj de Eŭropo tiel facile povis mortigi milojn da anabaptistoj. Tiuj homoj certe provis eviti la arestadon, sed kiam ili jam estis arestitaj, ili ne defendis sin, senrigarde, kiajn turmentadojn oni sur ili praktikis. Ili sopiris ankaŭ sub la plej forta sufero ami siajn torturistojn kaj persekutantoj, kiel Jesuo tion faris.

En la jaro 1545 Menno skribis en sia *Mallonga kaj klara kredkonfeso*:

„Vidu, miaj karaj amikoj kaj fratoj, per tiuj kaj aliaj tekstlokoj kaj argumentoj ni estos instruataj kaj avertataj nek alpreni la laŭvortan glavon nek ĝian uzon aprobi (escepte de la kutima glavo de la aŭtoritatoj, kiam tiu devas esti uzata), sed

nur la duflanke tranĉantan glavon de la Spirito, kiu venas el la buŝo de la Sinjoro, nome, la Dian vorton.“[10]

## Finaj pensoj kaj konkludoj

Ni vidas en Menno Simons viron, kiu komprenis transdoni al la pacema alo de la anabaptisma movado per siaj propraj verkoj decidan orientigon, kiu al la movado ebligis en la turbulenta tempo elteni kaj supervivi. Aparte distinga estis lia amo al la vero, lia volo, sekvi la gvidindikojn de la Sankta Skribo senkompromise kaj senkonsidere pri la perdoj.

La kortuŝaj atestadoj el lia tempo estas seriozaj admonoj por la kristanoj de la 21-a jarcento, ke ili samtiel senkondiĉe obeu la Sanktan Skribon kaj estu atestantoj de Jesuo Kristo en la perdita mondo. Sed ili estas ankaŭ la nepretervidebla avertsignalo, prepari sin por la suferado por Kristo. Ĉu ni, la tn. evangeliaj kristanoj, el tio lernos kaj iĝos preparitaj, kiam la persekutado super nin venos? Ĉu ni adiaŭos de la nebibliaj instruoj, por povi nian vojon nedamaĝitaj kaj konsekvence? Aŭ ni restos meze de la vojo stari? Estu, ke la Sinjoro nin per graco pridonacu, por ke ni povu Lian volon plenumi en ĉiuj punktoj!

---

**1.** Wenger, Die dritte **R**eformation (1963), p. 43-44.
**2.** Bühne, Ich bin auch katholisch. Die Heilige Schrift und die Dogmen der Kirche (1992), p. 71.
**3.** Bühne, Ich bin auch katholisch. Die Heilige Schrift und die Dogmen der Kirche (1992), p. 72.
**4.** Wenger, Die dritte Reformation (1963), p. 44.
**5.** Oehninger, Geschichte des Christentums (1897) p. 318.
**6.** Kurtz, Kirchengeschichte für Studierende (1890), p. 166.
**7.** Opera Omnia Theologica, of alle de Godtsgeleerde Wercken van Menno Symons. Amsterdam (1681), p. 28.
**8.** Dowley k. a. (eld.),The History of Christianity. Berkhamsted (1977), p. 402.
**9.** Opera Omnia Theologica, of alle de Godtsgeleerde Wercken van Menno **Symons,** Amsterdam (1681), p. 350.
**10.** Opera Omnia Theologica, of alle de Godtsgeleerde Wercken van Menno Symons. Amsterdam (1681), p. 470.

*Unue publikigita en la magazeno* ***Bibel und Gemeinde*** *112, kajero 1 (2012), p. 59-66. Represita kun amika aprobo.*

# Kompreno de komunumo
# ĉe la anabaptismaj eklezioj

*Elplume de d-ro Lothar Gassmann, Pforzheim*

1. ***La celo de la anabaptistoj kaj de aliaj partoj de la „maldekstra alo de la reformacio“ ne nomiĝas „reformacio“, sed „restitucio“: la renovigo de la instrua kaj komunuma „idealstato“ de la unua kristana situacio el la periodo de la apostoloj.***

Laŭ la vidpunkto de la reprezentantoj de la „maldekstra alo de la reformacio“ Lutero, Cvinglio, Kalveno kaj aliaj reformatoroj ne iris sufiĉe antaŭen, sed restis stari meze de la vojo. Ili ne atingis la novtestamentan idealon, sed faris tro da kompromisoj kun la katolikismo, kun la tradicio kaj la povon havantaj dukoj. Tiel ili ekzemple retenis la baptadon de beboj, praktikis nur duonkoran komunuman disciplinon kaj ne atingis la radikalan diferencigon inter la eklezio kaj la ŝtato. Kun tiu kritiko de la reformatoroj la reprezentantoj de la „maldekstra alo de la reformacio“ havis komunan opinion.

Cetere oni povas konstati, ke la „maldekstra alo“ konsistis el pluraj fluoj, kiuj postsekvis diversajn celojn kaj ilia radikaleco estis diverskaraktera. Tiel ekz. la anabaptistoj de Münster havis kun la anabaptistoj el Svisujo nenion komunan, kaj same malofte oni povus meti la spiritualistojn, la hutteranojn, la mennonitojn kaj antitrinitarianojn teologie sub la saman ĉapelon (kiel oni emis fari koncerne iliajn kontraŭantojn – antaŭ ĉio post la falo de la reve-hiliasma „anabaptisma regno de Münster“ en la jaro 1535).

Nun mi emfazas la centran punkton ĉe la ekleziologio de la moderaj anabaptistoj, kiuj ĝis nia tempo prezentas por la baptistaj komunumoj certan modelfunkcion. La baptisto Franklin H. Littell preferas en sia verko „La memkompreno de la anabaptistoj“ (1966), kiu estas kunkonsiderata en la sekvanta prezento, kontraŭ la polemika etiketado „anabaptistoj“ kaj „rebaptantoj“, la memnomadon kiel „la svisaj fratoj“, „la hutteranaj fratoj“, „mennonitoj“ ktp.

La ĉefa celo de la anabaptistoj estis „restarigo de la vera eklezio laŭ la novtestamenta modelo“ (restitucio). Littell estas konvinkita, ke la anabaptismo enkorpigas la „trian tipon“ apud la katolikismo kaj la protestantaj ŝtateklezioj, alportante „radikalan novkomencon“. Laŭ lia observo estis „la anabaptisma revolucio tiel trapenetra“, ke ĝi „prezentas novan fenomenon *sui generis* en la historio de la kristaneco. Oni povus tiel ne nur paroli pri luterana kaj reformita „eklezioj de la

reformacio“, sed aldone ankaŭ pri la anabaptisma „eklezio de la restitucio“ (vidu p. 122s).

La bazo de la restitucio estas la religia primarismo, tio signifas, la rigardo, ke la aferoj dum la praperiodo estis pli bonaj ol la sekvaj evoluoj. Ju pli tiu aŭ tiu eklezio de tiu prastato distanciĝis, tiom pli malbona ĝi estas; ju pli la eklezio al ĝi proksimiĝas, tiom pli bona estas ĝia pureco kaj ĝia spirita forto. Dum la reformacia periodo tiu ĉi rigardo estis vaste disvastigita kaj diversaj grupoj vetkuris per diversaj instrumentoj atingi la plej eble plenan proksimiĝon al la tiel supozita idealstato de la novtestamenta prakomunumo.

Laŭ Littell tiu „revo pri la prakomunumo“ estis la nura fadeno, kiu tiriĝis tra la tuta „maldekstra alo de la reformacio“ kaj kunligis „la spiritualistojn kaj la anabaptistojn, la svisajn fratojn kaj la polajn fratojn, la schwanckelderanojn kaj la hutteranojn, la mennonitojn kaj la disĉiplojn de Sebastian Franck kaj Adam Pastor“. „La fina celo estis la restarigo de la prakomunumo, kaj post tiu restarigo devus sekvi la triumfo de la ĉiela regno sur la tero (vidu: S. 82).

La anabaptisma primitivismo kaj restitucia pensmaniero estis en sia etikaj kaj sociaj implikadoj influitaj de la humanismo (emfazado de laika elemento, de simpla vivo laŭ la Prediko sur la monto, la pacifismo, la postulo de religia libero) kaj de joachimismo (starigo de pura eklezio en la epoko de la Spirito). Ĝi staras sur la imago pri la defalo de la eklezio de la novtestamenta idealo kaj sur la emo konstrui eklezion, laŭeble plej proksima al la ideala stato. La falo estas regule identigita kun la fondo de la ŝtateklezio fare de la imperiestro Konstanteno la Granda (306-337), kiu la „oran epokon“ de la praeklezio finabolis. Tiu praeklezio estis karakterizita, laŭ la imago de la anabaptistoj, per diseco disde la ŝtato, persekutado, pacifismo, amkomunismo, simpleco, baptado de la kredantoj kaj konsekvenca apliko de la komunuma disciplino.

En la cezar-papisma amaseklezio ĉio-ĉi ne plu estis ebla. El la persekutita baldaŭ estiĝis la persekutanta eklezio kun ĉiuj korespondaj apudfenomenoj. Estas menciinde, ke apud la jam nomitaj troviĝas almenaŭ pliaj provoj difini la daton de la okazintaĵo, kiuj klare montras intereson de tiuj, kiuj provis difini. Tiel la kontraŭantoj de la trinitaristoj datumas la falon de la eklezio per la koncilio de Niceo (325), dum kiu estis proklamitaj la centraj trinitaraj dogmoj. Menno Simons vidis la pinton de la eklezia falo – post la komencoj sub Konstanteno – en la jaro 407, kiam la papo Inocento I-a per aparta edikto faris la baptadon de la beboj ĝenerale deviga. La Polaj Fratoj vidas la komencon de la falo ek de la morto de Simeono, la „lasta okulatestanto“ de la vivo de Jesuo en la jaro 111.

Male al tiu ĉi ekstreme rigardata datumado pledis Marteno Lutero por pli malfrua datumado por la falo de la eklezio. Li vidas ĝin enpaŝi, kiam mallongtempe post Gregorio la Granda (590-604) la institucio de la papeco komencis de-

poni mondajn postulojn. La regtempon de Konstanteno kun establado de la ŝtate eklezio Lutero tamen observis kiel la disfloran tempon de la kredo.

Kiamaniere en la tempo post la falo, la kontinuo de la aŭtenta eklezio restis retenita? Laŭ la vido de plimultaj grupoj ene de la „maldekstra alo de la reformacio" tio okazis per tiuj personoj kaj unuiĝoj, kiuj flanke de la rom-katolika eklezio estis persekutitaj kiel „herezuloj", kiel ekzemple valdensanoj kaj albigensanoj, la fraticelanoj, John Wiclif kaj Johano Hus. Nur la tre radikalaj anabaptistoj (kiel en Münster) volis sin prezenti kiel tiuj, kiuj sen historiaj antaŭuloj senpere denove sin konektis al la novtestamenta idealo.

***2. La restitucio inkluzivas certajn kredsintenojn kaj kondutmanierojn, kiuj laŭ la kompreno de la anabaptistoj eliras el la Nova Testamento, antaŭ ĉio la demando de la baptado surbaze de la kredo, pri la disciplino en la komunumoj, pri la mondo kaj pri la memstara rilato al la aŭtoritatoj.***

**a.** ***Baptado surbaze de la kredo:***

Kun la novtestamenta komunuma idealo laŭ la rigardo de la anabaptistoj la baptado de la senkonsciaj beboj – kaj tiel la akcepto „de ĉiuj kaj de ĉiu" – ne estas kongrua. Eĉ pli, nur tiaj homoj povas fariĝi membroj de la komunumo, kiuj laŭ la persona rekono de la pekoj kaj la pento alprenis Jesuon Kriston kiel sian savanton kaj Sinjoron kaj kiel la signon de sia konfeso kaj de sia nova vivo aspiras esti baptitaj. Tiel al la baptado ne estas atribuita sakramenteca savkaraktero (gracdonaco de Dio), sed simbola konfeskaraktero (konfeso de kredo kaj agnosko de obeemo fare de la homo). La regule plenkreska baptito propravole alstrebas la baptadon kaj eniras la ligon kun Dio kaj kun la komunumo kun la celo vivi kristanan kaj obeeman vivon.

Tiel tekstas en la katekismo „Shleitheimer Artikel", la plej malnova kaj grava konfesteksto de la germanaj anabaptistoj en Svisujo, gviditaj de Michael Sattler, en la jaro 1527: „La baptado devus esti praktikata super ĉiuj, kiuj estis instruitaj pri la pento kaj ŝanĝo de la vivo kaj vere kredas, ke iliaj pekoj estis forprenitaj fare de Kristo, kaj super ĉiuj, kiuj volas iradi en la resurekto de Jesuo Kristo kaj kun li esti entombigitaj, por ke ili kun li povos releviĝi, kaj super ĉiuj, kiuj tion sub tia pensado de ni deziras kaj el si mem postulas. Tiel estas ĉia baptado de la infanoj ekskluzivita kaj estas la unua kaj la plej granda abomenaĵo de la papo" (citita laŭ: H. A. Oberman, Die Kirche im Zeitalter der Reformation, Kirchen- und Theologiegeschichte in Quellen III, 1981, 141).

**b.** ***Disciplinigo en la komunumo*** ("anatemo"):

La praktikado de la „anatemo“ estas dense ligita al la kompreno pri la baptado. Gi devus esti realigata ĉe tiaj membroj de la komunumo, kiuj per siaj publikaj falsaj instruoj kaj pekohava vivmaniero malrespektas la per la bapto konfirmitan ligon kun Dio kaj komunumo, kaj malgraŭ la pluraj admonoj ne estas pretaj sin returni. La disciplinigo en la komunumo estas nepra, por reteni la bonan renomon de la komunumo, ŝirmi de ĝi la damaĝojn kaj la anatemitajn stimuli al returniĝo. Aparte severa devas esti la disciplinigo en la komunumo rigarde al la vespermanĝo de la Sinjoro, al kiu nur tiuj havas alpaŝon, kiuj per sia kredkonfeso, sia vivŝanĝo kaj sia pentpreteco sin pruvas esti kredantoj. Tiu tamen, kiu vivas sub konata herezo kaj en peko, havas – cetere simile kiel la bapto komprenata simbole (kiel la komunuma memorfesto) – al la vespermanĝo de la Sinjoro nenian alpaŝon.

Tiel en la katekismo de Schleitheimer estas difinite: „La anatemo devus esti praktikata ĉe ĉiuj, kiuj sin disponigis al la Sinjoro, ke ili postsekvos liajn ordonojn, kaj ĉe ĉiuj, kiuj estis baptitaj en unu korpon de Kristo, lasis sin nomi fratoj aŭ fratinoj kaj tamen foj-foje elreliĝis, falis en herezon kaj en pekojn kaj subite estis supervenkitaj Tiuj devas esti dufoje admonitaj en sekreto kaj la trian fojon publike antaŭ la tuta komunumo esti refutitaj aŭ anatemigitaj laŭ la ordono de Kristo. Sed tio devas okazi laŭ la reglemento de la Spirito de Dio antaŭ la rompado de la pano, por ke ni ĉiuj unuanime kaj en unu amo de la pano rompu nian pecon kaj povas manĝi kaj el unu kaliko trinki“ (fonto supre).

### c. *Separiĝo for de la mondo*

kaj memstareco de la komunumo rilate al la monda aŭtoritato: La provo, distancigi de la komunumo la nespiritajn elementojn, ricevas kiel postsekvon akran limtiron rilate la „mondon“ – kvazaŭ kiel kulminon de la „mondo“ – ankaŭ rilate la aŭtoritaton. La anabaptistoj, neniam kiel Lutero, atingis ideon, la provincdukojn engaĝi por la realigado de la spiritaj celoj, sed ili eliris el la idealo de la antaŭkonstantena, persekutita kaj suferinta martira eklezio, kiu siajn aferojn reglementis memstare sub la gvidado de Kristo kiel la nura kapo. La rilato al la ŝtato estis ĉe unuopaj rondoj tamen diferenca. La paletro de eblecoj iris ek de la totala rifuzo pagi impostojn, servi en armeo kaj de ĵuro trans certagrada akceptpreteco rilate la „devoj de la subuloj“ ĝis la plena partopreno kun interna konscio pri la diferenco inter la eklezia kaj ŝtata kampoj.

La artikoloj de la katekismo el Schleitheim reprezentas je tiu ĉi demando tre radikalan pozicion. Ili cetere agnoskas la glavopovon de la ŝtato, tamen ili ekskludas por kristano la eblecon, tiun glavon uzi aŭ transpreni oficon en la ŝtato: „Finfine oni konstatas, ke por la kristano el sekvaj kialoj ne decas esti parto de la aŭtoritato. La regimento de la aŭtoritato estas laŭ la karno, dum de la kristano laŭ

la spirito. Iliaj domoj kaj loĝejoj estas kunkreskitaj kun la mondo; tiuj de la kristanoj troviĝas en la ĉielo. Ilia ŝtataneco estas en tiu ĉi mondo; la ŝtataneco de la kristanoj estas en la ĉielo. La armiloj de iliaj konfliktoj kaj militoj estas karnaj kaj ekskluzive kontraŭ la karno; la armiloj de la kristanoj tamen estas spiritaj kaj kontraŭ la fortikaĵoj de la diablo. La mondecaj homoj estas armitaj per pikiloj kaj per feraj kirasoj; la kristanoj tamen estas armitaj per la kiraso de Dio, per la vero, justeco, paco, kredo, savo kaj per la Dia vorto“ (fonto supre).

**d. La komuneco de la bonaĵoj** (amkomunismo)
estas la sekva marko menciinda, kiu tamen nur ĉe certa parto de la anabaptismaj komunumoj, kiel ekz. ĉe la hutteranoj estis kaj daŭre estas konsekvence praktikata.

***3. La nuntempaj liberekleziaj modeloj de baptisma karaktero estas en diversa mezuro influitaj per la anabaptisma modelo el la reformacia tempo.***

Al la nuntempaj komunumoj kun anabaptisma karaktero apartenas en pli densa senco la baptistoj, la mennonitoj kaj la hutteranoj. Aldone la baptado surbaze de la kredo estas praktikata aŭ preferata ĉe la biblie fonditaj komunumoj, liberaj evangeliaj komunumoj, fratecaj komunumoj, la eklezio de nazarenanoj, diversaj pentekostaj eklezioj, la adventistoj de la sepa tago kaj aliaj. La liberaj eklezioj, kiel la memstara Evangelia-Luterana Eklezio kaj la Evangelia-metodista Eklezio (metodismo) instruas kaj praktikas kontraŭe la baptadon de beboj. Tiel oni la „liberajn ekleziojn“ kaj la „baptadon surbaze de la kredo“ ne povas identigi, sed nur diri, ke la plimulto de la liberaj eklezioj reprezentas la baptadon surbaze de la kredo.

Dum en la landoj kiel Anglio, Francio, Holando kaj Usono jam ek de la 16-a jarcento malgraŭ kelkaj persekutoj ĉiam denove troviĝis iniciatoj por fondi liberajn ekleziojn, ilia oficiala fondado en Germanio estis ebla nur post la revolucio en la jaro 1848. Tiel en la jaro 1849 estis fondita „Ligo de baptismaj komunumoj en Germanio“. En la jaro 1941 tiu ligo aliĝis al la „Ligo de liberekleziaj kristanoj“, veninta el la frateca movado, kaj tiel rezultiĝis „Ligo de evangeliaj liberekleziaj komunumoj“ kaj tiel ĝi momente en Germanio estas la deka plej granda libera eklezio en la germana spaco (ne konsiderante ankaŭ la anabaptisme determinitan kaj de tiu ĉi ligo ekskluzivitan grupon de elmigrintaj komunumoj). La mennonitoj kaj hutteranoj atingis nur en Usono kaj Ruslando parte certan signifon, la mennonitoj antaŭ ĉio per elmigrintoj el Oriento intertempe ankaŭ en Germanio mem.

La baptisme difinitaj liberaj eklezioj transprenis de la anabaptistoj el la reformacia epoko precipe la baptadon surbaze de la kredo kaj la principon de propra volo (sendependeco de la ŝtato). La disciplinigo en la komunumo kaj apartiĝo de la mondo estas praktikataj kun tre diferencaj konsekvencoj. En multaj liberaj eklezioj troviĝas samtiel rivalecoj inter la nove vekiĝintaj kaj liberalaj fluoj, kiel ankaŭ en la popolaj eklezioj. Kie la liberaj eklezioj iĝis tre grandaj, ili pri la apartiĝo de la mondo kaj de la ŝtato preskaŭ plene rezignis, kiel ekzemple la baptistoj en Usono, el kiuj eĉ venis pluraj ŝtatprezidentoj. Kontraŭe al tio la malgrandaj grupoj, kiel la hutteranoj, daŭre tenas severe la apartiĝon, restas ĉe radikala pacifismo kaj komuneco de la bonaĵoj.

Interne de la nunaj baptistoj troviĝas multaj diversaj fluoj. Tamen troviĝas certaj eklezi-sociologiaj komunecoj inter ĉiuj baptistoj, kiujn Wiard Popkes – aldone al la laboraĵo de John David Hughey (Die Baptisten, 1959) – reduktis je komuna deminatoro:

„Orientiĝo laŭ la novtestamenta eklezio; persona kredosperto kaj baptado surbaze de la kredo; videbleco kaj konkreteco de la eklezio (pro tio la emfazo de la loka eklezio); kristana vivmaniero (konsidero de la etiko; pro tio ankaŭ instrukcio kaj komunuma disciplinigo); komunumo kiel la komuneco de la egalaj, kvankam kun diferencaj donacoj (partopreneco, ĉiu estas grava; jes gvidantaro, sed ne la aŭtoritateca gvidado); certa organizeco (ankaŭ en la senco de la Ligo, *covenant* – interkonsento – de la kredantoj, distinge de aliaj liberaj grupiĝoj); aŭtoritato de Kristo (spirita teokratio); apud la principa memstareco de loka komunumo interligo kun aliaj komunumoj.“ Tiu ĉi karakterizo validas laŭ Popkes „por la baptistoj en la plej diversaj geografiaj, kultraj, politikaj kaj sociaj regionoj“ (Wiard Popkes, Gemeinde, Raum des Vertrauens. Neutestamentliche Beobachtungen und freikirchliche Perspektiven, 1984, 185f.).

*Elprenita el: Lothar Gassmann: WAS IST KIRCHE? Papstkirche, Staatskirche oder Gemeinschaft der Glaubenden? Grundlinien biblischer Ekklesiologie, 178 paĝoj, 9,80 Euro (akirebla ĉe la aŭtoro: Logass1@t-online.de)*





# Kial mi min preskaŭ 30 jarojn post mia konvertiĝo lasis bapti?

Mi naskiĝis en la jaro 1958 kaj ricevis, ĉar la situacio de mia patrino kaj mia propra situacio estis tre riskaj, als bebo la katolikan „nepran bapton“. Post tio mi trairis ĉiujn katolikajn staciojn – tra la unua komunio kaj konfirmacio ĝis mia preskaŭ duonjare daŭra rekonvalescenta tempo kiel okjara infano en iu katolika monakejo.

En Decembro 1976 – tiam mi estis 18 jarojn aĝa – montris al mi la Sinjoro Jesuo Kristo pere de la Dia vorto okaze de mia biblia studado kaj dum iu evangelizado, ke mi estas perdita pekulo. Mi rekonis mian kulpon, mi pentis pro tio, mi konfesis miajn pekojn al Jesuo Kristo kaj lin petis je pardono kaj purigo. Kiel homo, kiu ĝis tiam ne nur en la katolika religio, sed ankaŭ en diversaj aliaj religioj kaj mondpercepto j (antaŭ ĉio en budhismo kaj antroposofio) vane serĉis savon, mi nun Jesuon kiel la nuran veran savanton kaj Sinjoron rekonis kaj alprenis en mian koron. El amo al li kaj kiel akto de obeemo al lia vorto mi ankoraŭ en la sama jaro forlasis la romkatolikan eklezion, ĉar mi la instruon de ĝi kun la instruo de la Biblio ne povis preni en kongruon.

En la katolika eklezio troviĝas instruo, ke la suĉulo okaze de la bapto per la Spirito de Dio fariĝas nove naskita estaĵo (Taufwiedergeburtslehre). La bapto validas kiel verdire magia („sakramenteca“) akto, pere de kiu la baptito estas enkorpigita en la katolika eklezio kiel la „mistika korpo de Kristo“. Similaj instruoj estas trovataj ankaŭ en kelkaj evangeliaj eklezioj (aparte ene de la luterana eklezio). En la nuntempa popoleklezia tradicio estas tiel, ke pere de la suĉula baptado la ekzisto de la popola eklezio estas garantiita, ĉar la anoj de ĝi estas aldonitaj antaŭ ol tiuj povas konscie decidi por aŭ kontraŭ sia eklezia aparteno.

Jam de ĉiam mi havis demandojn, ĉu la suĉula baptado ĝenerale kaj aldone en la formo, kiel mi ĝin ricevis, flanke de la Dia vorto, de la Bibio, estas pravigita. Dum multaj jaroj mi apogis min interne kaj dum interparoloj kun alie pensantaj sur la bibliaj teksteroj kiel Mateo 28,19-20 („Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito; instruante ilin observi ĉion, kion mi ordonis al vi“) kaj aparte la „dombaptadojn“ en la Agoj de la apostoloj 16, vers. 15 kaj 33 („li/ŝi lasis sin bapti kun sia/ilia tuta domo“; komp. ankaŭ en Agoj 18,8 kaj 1 Korintanoj 1,16). Kutima argumentado diras, ke tie ankaŭ la infanoj kaj suĉuloj devis esti inkluzivitaj. Mi legis tiujn vesiklojn ĉiam denove, sed fine mi devis agnoski, ke oni ĉi tie interpretas ion en la tekston, kvankam tio tie ne estas skribita.

Nun mi dum mia teologia esploro ĉiam denove reprezentis la starpunkton, ke oni devas okaze de la kristanaj instruoj kaj manieroj agi ĉiam eliri de la klaraj, sendubaj tekstlokoj. Nur – strange – ĉe la demando pri la baptado, mi apogis min sur la ne klaraj tekstlokoj dum jardekoj, certe ankaŭ pro homnatura kaj eklezia konsidero (mi estis inter 1977 kaj 1999 ano de la evangelia landa eklezio, poste inter 1991 kaj 1993 vikario en ĝi). Sed se mi nun la klarajn eldirojn de la Sankta Skribo pri la bapto observis, tiam por mi klare montriĝas jeno:

**Unue: La klara sinsekvo okaze de la bapto en la Nova Testamento tekstas: *unue la kredo, poste la bapto*** (legu pri tio ĉe Marko 16,16; Agoj 2,38.41; 8,12s.36-38; 9,18; 10,43-48; 18,8; 22,16; Galatanoj 3,25s. k.a.).

**Due: Baptitaj estas nur la homoj, kiuj pri sia malnova vivo faris *penton* kaj Jesuon Kriston kiel sian savanton kaj Sinjoron alprenis** (komparu kun la samaj bibliaj tekstlokoj).

**Trie: La kristana bapto simbolas la morton de la malnova homo en la akvo (baptotombo) kaj la *resurekton* de la nova, per la fido savita homo** (komparu la modelon de arkeo ĉe 1 Petro 3,20s. kaj same ĉe Romanoj 6,3ss. kaj Kolosanoj 2,12).

**Kvare:** El tiuj klaraj bazaj instruoj de la Sankta Skribo montriĝas la konkludo, ke **ankaŭ la „dombaptadoj“ en la Agoj de la apostoloj kaj ĉe 1 Korintanoj 1,16 tiun specifon kunportas,** ja eĉ ĉe pluraj tekstlokoj estas eksplicite menciite, ke al la baptotoj antaŭe estis anoncita la evangelio kaj ili atingis la fidon: „Kaj ili parolis la vorton de la Sinjoro al li kaj al ĉiuj en lia domo“ (Agoj 16,32). „Kaj Krispo, la sinagogestro, kredis al la Sinjoro kune kun ĉiuj siaj domanoj; kaj multaj Korintanoj, aŭdinte, kredis kaj baptiĝis“ (Agoj 18,8). Do ankaŭ ĉi tie la sinsekvo: unue la pentopreta fido surbaze de la vortanoncado – kaj nur post tio la baptado. Aldone el la klaraj bazaj instruoj de la Nova Testamento eliras la konkludo, ke ĉe **Mateo 28,19-20** la *disĉiploj* el ĉiuj popoloj (kaj ne la nacioj kiel tuto) estas konsiderataj, estinte baptitaj kaj post ilia konvertiĝo plie instrukciitaj en la instruo de la kredo. **La komunumo de Jesuo estas en la Nova Testamento tutece la komunumo de la disĉiploj – kaj ne la eklezio de la popolo!**

*El tiu ĉi rekono montriĝis por mi la konsekvenca obeemo al mia Sinjoro kaj Savanto Jesuo Kristo, lasi min bapti tiel, kiel estis kutime en la komunumo de la unuaj kristanoj. La 2-an Oktobron 2005 mi estis baptita en Pforzheim en la rivero Nagold en la nomon de la triunua Dio. Gloro kaj danko al la Sinjoro!*

*Lothar Gassmann*

# Kiel Georg Müller atingis klarecon pri la bapto

Mi denove petis Dion, min en tiu ĉi grandsignifa afero instrukcii, kaj mi legis la Novan Testamenton ek de la komenco kun aparta konsidero de tiu ĉi punkto. Nun tamen, ĉar mi la aferon tuŝis kun tia seriozo, atingis min certa nombro da obĵetoj:

1. „Ĉar multaj sanktaj kaj klerigitaj viroj pri tiu ĉi punkto havis kaj havas diferencajn rigardojn, ĉu tio ne estas pruvo, ke ni en nia nuna neperfekta stato de la eklezio ne atendu atingi kontentigan konkludon pri tiu ĉi punkto?“ – Tiu ĉi obĵeto estis forigita tiel: „Se en la Biblio estas revelaciite, kiu estas la vera laŭbiblia kompreno pri la baptado, kial do mi ne povus atingi la rekonon pri tiu ĉi vero, ja la Spirito nun, kiel ankaŭ antŭe, estas la instruisto de la eklezio?"
2. „Nur malmultaj el miaj amikoj estis bptitaj, kaj la pli multaj el ili en kontraŭo al la bapto de la kredantaj, kaj tiuj turnus al mi sian dorson.“ – La respondo: „Eĉ se ĉiuj homoj min forlasus, kaj tiel nur Jesuo havus kun mi komunecon, mi estus feliĉa.“
3. „Vi certe perdos duonon da viaj enspezoj, se vi estos baptita.“ – La respondo: „Tiom longe, kiel mi serĉos esti fidela al la Sinjoro, Li ne lasos min suferi en mankoj.“
4. „La homoj nomos vin baptisto kaj vi estos konsiderata adepto de tiu ‚sekto’, kaj apude, ja vi ne povas aprobi ĉion, kio ĉe tiuj okazas.“ – La respondo: „Ankaŭ se mi min lasas bapti, el tio ne sekvas, ke mi kun tiuj, kiuj vidas la baptadon surbaze de la kredo kiel veron, pri ĉiuj aliaj punktoj kun ili devus konsenti.“
5. „Vi nun jam de kelkaj jaroj predikis kaj vi nun publike atestos, ke vi troviĝis en misa kompreno, se ĉe vi ekhelos rekono, ke la baptado surbaze de la kredo estas la ĝusta.“ – La respondo: „Estas multe pli bone atesti, ke oni estis en tiu ĉi aspekto en miskompreno ol en ĝi obstini.“
6. „Eĉ se la baptado surbaze de la kredo estus la vera, estas tamen tro malfrue lasi vin bapti, ja oni ĵus post iĝi kredanta, devus esti baptita.“ – La respondo: „Estas pli bone, ordonon de Jesuo plenumi, eĉ se tiel malfrue, ol plu vivi neglektante ĝin.“

Georg Müller (1805-1898), misiisto kaj unu el la „patroj“ de la fratara movado; li fondis en la jaro 1836 la famajn orfinstitutojn en Bristolo.

FONTO: JOHANNES WARNS: DIE TAUFE, R. BROCKHAUS-VERLAG, WUPPERTAL UND ZÜRICH, 3. ELD. 1992, S. 252-254



# La fono de muzikindustrio

Lernantino pridemandas la muzikistojn de tekno- kaj rokmuziko
pri la sensŝminka realo de ilia profesio

**Enkonduko**

Sur sekvaj paĝoj mi raportas pri la fono, pri la mekanismoj kaj procedoj ene de la muzikindustrio. Mi tiun ĉi temon elektis, ĉar mi volonte pri tio okupiĝas, kio do okazas malantaŭ la kulisoj. Kiel la steluloj vere fartas? Oni vidas ilin en amaskomunikiloj ĉiun tagon marŝi ridante sur la ruĝa tapiŝo, sed subite tiu aŭ tiu turneo estas pro depresio nuligita. Tiam ili estas amaskomunikile priĵetitaj per merdo, ĉiu paparaco provas ricevi por si la plej bonan anekdoton. Kial tio tiel okazas?

La vojo de certa stelulo tra ties altoj kaj malaltoj interesas min kaj stimulis min por tiu ĉi temo. Kiel ekzemplon por tio mi elprenis Justinon Bieber. Lia aĝo estas 22, sed jam ek de la 14-a jaro li enpaŝis la muzikan branĉon. Surbaze de lia vivkuro oni povas bone rekoni, kion vere signifas, subskribi kontrakton kun muzika priduktejo.

Sed ĉar multo ankaŭ ne troviĝas en interreto, mi kontaktis homojn, laborantaj en la muzika branĉo kaj ilin demandis pri tio. Tiel mi havis eblecon, la aferojn prijuĝi objektive. Ili laboras en tri diversaj regionoj. Al ĉiuj mi starigis la samajn demandojn kaj tiel mi havas belan komparon el diversaj muzikaj ĝenroj.

La unua interparola partnero estas muzikproducento kaj DJ, la dua estas muzikisto, ludanta en orkestro, aperanta mondvaste, kaj la tria estis konata rokmuzikisto.

**Kiamaniere oni fariĝas stelulo?**

La grandaj steluloj, kiajn oni nuntempe vidis kaj postsekvis, kiam ili havis sian etan komencon… La plimultaj el ili dum sia juna aĝo partoprenis talentserĉan konkuron; ili kantis kun sia eklezia koruso aŭ ĉe lokaj aranĝoj aŭ estis malkovritaj per jutubo. Tiel same ankaŭ *Justin Bieber*. Li partoprenis kelkajn konkuradojn kaj

kantis kiel stratmuzikisto. Lia patrino ĉion filmis kaj publicis en jutubo. Verdire tiuj videofilmetoj estis faritaj por tio, ke la tuta familio tion vidi povus.

Kiam Justin aĝis 13 jarojn, anoncis sin la manaĝero Scooter Braun ĉe lia patrino. Li demandis, ĉu Justin povus veni al Atlanta, por tie registri provkantadon. Scooter Braun gvidas muzikan entreprenon kune kun Usher.[2]

Simple tiel publici muzikon tamen ne estas tiel facile. Pro tio multaj steluloj komencas kun kontraktoj *Major Labels*. Ili zorgas por publicado de muziko. Multaj havas ankaŭ pli grandajn koncernojn kiel *Disney* aŭ *Nickelodeon* malantaŭ sia dorso, tiuj helpas ankaŭ por publicado de CD-oj. Troviĝis ankaŭ kelkaj komplikaĵoj, ĉar Justin estis ankoraŭ tro juna kaj ankaŭ havis neniun grandan koncernon malantaŭ sia dorso. Usher kaj Braun demandis ĉe multaj registrejoj, ĝis Justin finfine ricevis kontrakton ĉe *Island Records*.[3]

**Diskproduktaj kontraktoj, ĉu la vojo al sukceso?**

Kiel ni nun scias, tio estas la plej imageble bona vojo, sian muzikon rapide grandkvante disvastigi. Oni gajnas monon per tio, kio donas plezuron: per muziko. Oni verkas proprajn tekstojn kaj produktas propran sonaron. Sed ne ĉiam tiel estas. En intervjuo por *„Berlin Fucking City“* (*sorry* – pardonu) estis invitita iu iama gajninto de la talentserĉa konkurado, kaj tiu klarigis, ke la afero ofte iras alian vojon. Oni subskribas kontrakton kun iu muzikproducento, kaj ili promesas promocii vian muzikon grandskale. La malbona flanko: Tuj, kiam vi la kontrakton subskribis, la produktejo havas vin en siaj manoj. Kion mi trovis tre surpriza, estis, kiam li diris, ke la produktejo proponas al li proprajn tekstojn kaj difinas, kian muzikan ĝenron la kanzono havi devas. Ĉio devas akomodiĝi al la spirito de la tempo. Tio, kion la homoj ĵus plej volus havi, tion oni produktas. Ekster tio la homoj estas amaskomunikile influataj aŭskulti certajn muzikdirektojn.[4]

Ofte oni starigas al si demandon: Kial povas la steluloj vivi tiel „mirindan“ vivon (supraĵe rigardate)? Ĉiam perfekte ŝminkitaj aŭ stilizitaj, kun dezajnitaj vestoj sur la ruĝa tapiŝo. En ĉiu semajno flugi alian direkton, ĉion povi akiri. Sed tiel la afero ne okazas. Tio estas ŝajno, kia tian karieron al ekstero montras. Nature devas la kantisto / la muzikisto por tio ankaŭ ion doni.

Katy Perry estis dum intervjuo demandita, kiamaniere ŝi fariĝis tiel sukcesohava. Ŝia patro estis pastoro kaj tiel provis eduki ŝin religie. *„(...) I wanted to be like Amy Grant, but it didn't work, so I sold my soul to the devil.“*[5] Amy Grant

---

[2] Wikipedia „Justin Bieber“

[3] Wikipedia „Justin Bieber“

[4] Talkshow „Berlin Fucking City“ kun Martin Kesici

[5] The 7pm project- Ruby Rose intervjuoj kun Katy Perry

estas kristana kantistino kaj ne tre konata. Unu sola kanzono prezentis ŝin grandskale.[6]

Surprize, multaj steluloj jam publike dum siaj koncertoj, en siaj tekstoj aŭ intervjuoj diris, ke ili sian animon vendis. Tiel oni jam havas indikon pri la depresioj, kiuj ĉe la steluloj ofte aperas. Ili ekster tio ricevas de ĉiu flanko enorman premon sur sin, ĉar ili ĉiam devas esti perfektaj kaj modelaj. Tion skribis Justin Bieber foje enkadre de sia poŝto en instagramo.[7] Surbaze de tiu premo li ofte nuligis ĉiujn *Meet&Greets* – salutrenkontojn.

La posedantoj de la muzikproduktejoj havas en sia kapo nenion krom mono, kiun ili pere de la kantistoj povas gajni. Ĉu tiu persono poste kolapsas, ludas por ili nenian rolon. Se certa stelulo mortas, la kolektoj povas senĝene esti daŭre vendataj kaj ekzemple per la ne jam publicita muziko eĉ esti pli sukcese enmerkatigataj. Tiel oni parte profitas eĉ pli de la stelulo, kiam tiu ne plu vivas.

**La vivo de mondstelulo**

Ĉion-ĉi do oni devas akcepti, se oni volas esti renoma. Justin Bieber tiam havis aĝon de 15 jaroj, tio signifas, ke lia patrino subskribis kontrakton por li. Por la 15-jaraĝa fraŭlo ĉio komenciĝis bone: la unuaj registradoj de *single* diskoj, la tion postsekvanta kolekta disko kaj unuaj prezentadoj en diversaj urboj de Kanado. La kolektodisko poste same estis prezentita en Usono. Justin kantis por la prezidento kaj prezentiĝis okaze de *New Years Rocking Eve*. Tiel laŭ la promeso de la kontrakto ne daŭris longe kaj Justin fariĝis kun sia dua kolekto la plej juna virgenra artisto post Stevie Wonder 1963. Anonciĝis la unua koncertvojaĝo. Ĝi startis en Usono en Junio 2010 kaj finiĝis en Decembro kun 77 koncertoj, antaŭ ĝi en Marto 2011 en Eŭropo plu daŭris. En 2012 sekvis la nova kolektodisko, kiu ĝis nun estis la plej sukcesa.[8]

Post tio sekvis la falo. La unuaj fotoj pri la publika konsumado de drogaĉoj ĉe Justins aperis en interreto. Li ofte malfruis kaj siajn koncertojn ne povis ĝustatempe komenci. Tiel estis eldiritaj konvenciaj punoj. Kelkajn semajnojn post tio li dum sia koncerto kolapsis. La kaŭzo estis laŭ la informoj de lia manaĝero malfacilaĵoj de spirado. La dua koncertanta mondturneo komenciĝis kaj Bieber denove liveris skandalinformojn por la gazetaro. En Brazilo li dum la koncerto forlasis la scenejon, frekventis bordelon kaj vandale detruis sian hotelĉambron.[9]

---

6 „Baby Baby“ de Amy Grant

7 Instagram Profil pri Justin Bieber

8 Wikipedia „Justin Bieber“

9 Wikipedia „Justin Bieber“

Komence de la jaro 2014 Bieber estis arestita. Li estis laŭraporte ebria malantaŭ sia aŭtostirilo kaj aldone sen valida permesilo. En la sama jaro denove estis planita koncerta mondturneo por produkti la trian kolektodiskon, sed tio devis esti pro la depresioj ĉe Bieber nuligita. En la jaro 2015 Bieber denove iamaniere estis starigita sur siajn piedojn. Fine de tiu jaro li produktis sian kvaran kaj plej aktualan diskkolekton *Purpose*.[10]

Se oni ĝuas tian renomon, tiam okazas aldone, ke oni ne devus permesi al si misagojn. Tuj, kiam oni decidas fari ion misan, ion ilegalan aŭ cetere malbonan, la amaskomunikiloj kaj la paparacoj tuj troviĝas surloke. Tuj kiam oni forlasas sian domon, estiĝas pri ĉio farita fotoj. Ĉiu ĉiam scias, kien iri. Kaj el la plej malgrandaj okazintaĵoj estas farita granda dramo, ĉar la amaskomunikiloj ĉion diritan turnas kaj ĉion eblan lasas ŝajni en la formo de skandalo.

Okaze de intervjuo kun „NME“ parolas Justin Bieber ne nur pri depresioj, sed ankaŭ pri ilia fonto. Li kulpigas la gazetaron por ĉio-ĉi. Ĉiam temas pri paparacoj kaj fanatikuloj, kiuj la homon postsekvas ĉie kaj ĉien. Tio laŭ li estas la kialo, ke oni nenion plu povas entrepreni sola. Krom tio Justin rakontas pri la mortinta kantistino Amy Winehouse. Li vidis, kion la amaskomunikiloj al ŝi faris kaj kiel malbone ili ŝin traktis, ĝis de ŝi restis nenio. Tio laŭ li estas precize tio, kion ili ankaŭ kun li intencis fari. „Mi deziras, ke la homoj sciu, ke mi ankaŭ estas nur homo. Mi batalas por travivi la tagon kaj mi pensas, ke multaj tion faras.“[11] Ke ankaŭ li falis en tiun maŝon, vendi sian animon por la renomo, montras la foto de li okaze de iu el liaj aktualaj koncertoj. Sur lia ĉemizo estas skribite: *„Bigger than Satan – Bieber“* – pli granda ol Satano – Bieber.

**Intervjuo kun Patrick C., Michael L. kaj Fritz Springer**

Estis mia intereso, persone demandi al kelkaj tre diversaj muzikistoj, ĉar mi volis havi aŭtentajn respondojn kaj ne nur traserĉadojn en interreto. Mi starigis al ĉiuj tri la samajn demandojn por tiel vidi la paralelojn kaj povi fari konkludojn. Tiel mi ankaŭ povas kompreni, kiamaniere funkcias tiu branĉo fakte kaj pro kio Justin Bieber portempe tiel malbone fartas. Venis tre interesaj respondoj al miaj demandoj.

Patric C. estas DJ kaj teknoproducento[12], kies kreaĵoj estas ludataj tutmonde. Michael L.[13] estas libera profilmuzikisto de iu orkestro, ludanta internacie. Kaj Fritz Springer[14] estis kantisto en iu antaŭe tre sukcesa rokbendo.

---

[10] Wikipedia „Justin Bieber“

[11] Interview mit NME

[12] Persona kontakto kaj intervjuo per e-mailo

[13] Persona kontakto kaj intervjuo per e-mailo

La unua demando estis, kiamaniere oni venas en muzikbranĉon kaj kiajn lernejojn / studojn unuopaj personoj faris. Patrick rakontis, ke li kiel hobiulo komencis tiel, ke li faris sonkonstruaĵojn. Liaj gepatroj devigis lin fari la mekanikan lernadon, sed tiel li salajris monon por pliriĉigi siajn teknikajn istrumentojn. Li ludis unue dum jaroj ĉe malgrandaj aranĝoj kaj estis tie finfine de grandaj DJ aŭ muzikproduktejoj demandita registri diskojn aŭ vive ludi. Iun tagon iu agentejo lin demandis, volante lin transpreni. De tiu tempo li flugas, kiel li diras, en ĉiu semajno 2-3-foje ĉirkaŭ la terglobo.

Fritz Springer estas la iama ano de iu rokgrupo, kies nomon li ne volas mencii. Li ŝanĝis post la fino de sia kariero sian identecon kaj rakontas nun ekzemple en lernejoj pri sia tempo kiel rokmuzikisto kaj kion diversan li travivis. Li diras, ke oni per bonŝanco kaj rilatoj povas veni en tiun branĉon. Kompreneble ankaŭ la ekstera elrigardo ludas gravan rolon, agentoj daŭre serĉas talentulojn, kiujn oni povas bone enmerkatigi. Li havas neniun specialan edukvojon aŭ studunuon. Lia grupo estis en la 60-aj jaroj tre sukcesa kaj fine malkovrita de iu granda muzikproduktejo. Ili havis manaĝeron, kiu por ili preparis prezentaĵojn kaj tiel ili ricevis mendojn kaj kontraktojn.

Michael havis ek de sia elementa lernejo grandan intereson por sia instrumento kaj pli poste en Amsterdamo studis muzikon. Tiel li ekkonis multajn novajn homojn kaj ĉiam transprenis aliajn poziciojn en diversaj orkestroj. „La plimulto da homoj deekstere verŝajne pensas, ke profesia muzikisto estas iu, kiu vivas ekskluzive de la muziko. Tio fariĝis tre malfacila okazo kaj tial troviĝas multaj miksitaj formoj. En Novjorko lavas homoj probable dumtage telerojn por akiri monon, kaj vespere ili ludas koncerte. Unu el miaj amikoj faris tion fakte dum certa tempo. Tiel oni ne povas tiel klare diri, kiamaniere oni eniras aŭ ĉu oni jam troviĝas ene aŭ ĉu oni iam jam troviĝas ekstere. Je la fino ludas la kontaktoj kaj retejoj gravan rolon por liberprofesia muzikisto," li diras.

La dua demando estis, kio al la muzikistoj pleje kaj kio malpli plaĉas. Patrick opiniis: „La tekniko kaj la eventoj (…) diversajn aferojn unuigi kaj poste prezenti … jen tio estas ĉiun fojon denove super ĉio streĉsenta. Ankaŭ se mi spertas, ke mia muziko estos ludata! Tio estas freneze bela afero!" Kaj malpli: „Se io falas en pantalonon … kiel ekz. *laptopcrash* en la klubejo, kiam foje antaŭ … Ili pagas flugon / hotelon / manĝadon + honorarion… Kaj komputilo simple ne funkcias plu… Uf, tio estas tre aĉa sento… Sed tio, kion oni malplej ŝatas, estas krea truo! Kiam simple ĉio sonas merde… La proceduro post horoj ankoraŭ ne tuŝas min…

[14] Persona kontakto kaj telefonintervjuo; vivatestado en „Der schmale Weg" eldono 4/2013 de CGD / Lothar Gassmann

Kiam oni enlitiĝas kaj la tempo en la ateljeo estis senfrukta … Tie mi sentas min pliparte tre malkontenta.“

Fritz Springer diras, ke li nur komence trovis plezuron, ĉar li estis por la gazetaro interesa ulo kaj pro la fanatikuloj lia egoo povis salti alten. „Malpli plezura ĉioĉi estas tiam, kiam oni iĝas dependa de alkoholo kaj drogaĉoj. Tio okazas pro la *After Show* amuzrenkontiĝoj, kie la konsumado komenciĝas kiel plezuro, sed iam ĝi tio ne plu estas…“

Michael diras: „Mi simple tre ŝatas ludi trumpeton. Verdire ĉio en mia profesio estas por mi plezuro. Foje la situacio estas tre nervstreĉa kaj tro por certa momento, sed troviĝas aliaj fazoj, kiuj estas tre trankvilaj. Koncertoj, aperadoj ktp. kuras ĉiam laŭ tiu aŭ alia maniero kune al la sama punkto (la tempopunkto de prezentado). Pro tio troviĝas en tiu ĉi profesio relative multaj neeviteblaj tempolimoj kaj pliparte antaŭ la produktado troviĝas multe da nervostreĉo kaj premo, ĉar ĉiu emas havi sur la scenejo la plej bonan prezenton. Tio estas vere tre nervostreĉa resp. oni bezonas simple dikan haŭton. (…) Elŝalti povus do fariĝi provoko kaj ankaŭ tio ofte ne finas sen *burnout* – nervobrulo. Tio, nome, ankaŭ troviĝas ĉe la muzikistoj. (…) Alia dorsoflanko povus esti, ke oni laboras ĉiam tiam, kiam aliaj havas sian plezuron. Do kvazaŭ ĉiam vespere kaj semajnfine. (…) Vere multaj situacioj estas socie iel superrealaj kaj pro tio estas tute grave, havi bonajn sociajn kompetentojn. Survoje ekzemple oni dum semajnoj troviĝas kun la samaj homoj kaj oni foje havas senton, ke nun ili estas bonaj amikoj, sed vere ili nur estas kolegoj. Tio estas grava distingo ĝuste ĉe la muzikistoj.“

La sekva demando estis, ĉu la muzikisto havas kontrakton, kaj kio okazas, se oni volas ĝin eliri. Ĉe la demando, kio okazas, se oni volus la kontrakton forlasi, proponiĝas klara respondo: En la momento, kiam oni kontrakton subskribas, ĝi havas certan limdaton. Se oni dum tiu tempo denoncas, oni devas pagi altan sumon. Menciita estis ekzemple la sumo de 50.000 eŭroj; se temas pri kantistoj kiel Justin Bieber, tio nature faras kelkoble pli da tio. Patrick rakontas, ke li po ĉiu unuopa muzikpeco havas propran kontrakton. Kaj ke troviĝas kontraktoj, kiuj okupiĝas pri la publicado de via muziko, tian li ankaŭ havas. Fritz Springer ne povas pro sia identa ŝanĝo diri, ĉe kiu muzikproduktejo li havis kontraktojn, nur tiom, ke oni el tio ne povas ĝustatempe liberiĝi. Michael havas neniun kontrakton, li estas libera muzikisto en iu orkestro.

La sekva demando estis, ĉu troviĝas aferoj, kiujn oni sub tiu ĉi laboro devas teni en sekreto. Patrick diras: „En la tempo antaŭ la liberiĝo, antaŭ ĉio en tiu ĉi mp3 tempo!“ Se la muziko estas disvastigita en la interreto antaŭ ol ĝi estis publicita, tio damaĝas la postan vendadon. Okaze de reklamvideoj li ankaŭ jam devis subskribi kontrakton por sekrettenado. Tia respondo venis ankaŭ de Fritz Springer.

Tekstoj kaj notoj devas resti en sekreto. Michael diras, ke li nur siajn personajn aferojn tenas antaŭ la publiko por privataj, nome el propra intereso.

La lasta demando estis, kiamaniere la muzikistoj vidas la alian flankon de la sukceso kaj pro kio la steluloj estas depresiemaj. Patrick diras: „Se ili manĝas el via mano, tio estas la plej bona laboro en la mondo. Sed tuj, kiam la muziko renkontas malbonan akcepton, oni tion rapide traktas serioze. Oni rapide nenion plu valoras kaj oni ĉiam povas esti anstataŭata.“ Fritz Springer rakontas, ke sur la rokmuzika scenejo estas tre ofte celebrata la religio de Satano. Tion oni povas rekoni ankaŭ surbaze de tekstoj. Sed ne nur pro tio oni povas fariĝi depresiema, sed ankaŭ pro la tempa premo; aparte malkonvene tio estas dum la koncertvojaĝoj kaj tiam enmiksiĝas en la ludon ankaŭ alkoholo kaj drogaĉoj. Apud tio li fartis ĉiam denove solece malgraŭ la multaj homoj en la ĉirkaŭo. Lia savo el tiu marĉo estis, ke li trovis la fidon en Jesuon. Michael diras: „Ĉe multaj artistoj ĉiam denove ilia egoo estas la problemo, se ili kun sia arto ne sentas sin sufiĉe aprezataj kaj tiel ili falas en truon. Ĉe multaj situacioj oni sukcesas doni la plej altajn artajn atingojn, sed pri tio neniu en la ĉirkaŭo interesiĝas.“

Entute mi povas rekoni multajn paralelojn. Ili ĉiuj komencis kun pasio por sia muziko. Se poste venis grandaj sukcesoj kaj oni ne restas sur la planko de realo, oni perdiĝas en malstabilan mondon – kaj la sekvo ofte estas, ke oni ricevas depresion. Oni komencas mezuri sian propran valoron per „merkatvaloro“.

**Finrimarkoj / Konklude**

La rigardo malantaŭ la kulisojn montras, ke la ŝajno ofte trompas. Unue tio estas vere peza laboro, por akiri sukceson. Aliflanke konataj steluloj kiel Justin Bieber estas senkonsidere personajn perdojn surmergatigataj. La muzikistoj, kiuj simple amas sian muzikon kaj ne estas pretaj por subskribi „servutajn kontraktojn“, estas ankaŭ kun malpli da mono multe pli feliĉaj. Dum la preparo de tiu ĉi teksto iĝis por mi klare, ke la supozata revlaboro tamen havas multajn ombrojn. Ĝuste junaj homoj kiel Justin ne sukcesas resti sur la planko de faktoj kaj eskapi tiun amaskomunikan premon. Preskaŭ ŝajnas, kvazaŭ estus malbeno iĝi mondstelulo. Multaj steluloj estas depresiaj kaj multaj jam mortis pro drogaĉoj kaj alkoholo. Mia konkludo estas: Estis interesa, sed ankaŭ nervostreĉa laboro, tiun ĉi reton traspekti. Prefere oni ĉiam pripensu antaŭe, kiujn kontraktojn oni subskribu kaj ne lasu sin blindigi pro mono kaj renomo. Oni same devas pridemandi la spiriton de la tempo ĉe kelkaj muzikistoj.

*Leoni Keppler, lernantino*

ELĈERPAJN SCIENCAJN MATERIALOJN POR TIU ĈI ARTIKOLO ONI TROVAS ĈE:

ADOLF GRAUL:

**ROCK-, POP- UND TECHNOMUSIK UND IHRE WIRKUNGEN**

*EINE WISSENSCHAFTLICHE UND BIBLISCHE UNTERSUCHUNG,*

PAPERBACK, 320 PAĜOJ, 19,80 EŬRO,

EN LIBROVENDEJA RETO NE PLU AĈETEBLA,

RESTEKZEMPLEROJ EN LA SEKRETAEIEJO MENDEBLAJ!



# En propra afero: **Israelvojaĝo 2018 kaj represado de DER SCHMALE WEG**




Kara leganto,

kun ĝojo kaj dankemo al nia Sinjoro ni povas al vi mesaĝi, ke ni en kunlaboro kun SarEl-Tours denove povas proponi al vi **vojaĝon al Israelo „Sur la spuroj de Jesuo en la Sankta Lando“**, nome, inter la 21-a kaj 28-a de Majo 2018 (kun ebleco plilongigi restadon ĉe la Morta maro ĝis la 31-a de Majo). Pli precizajn informojn vi povas postuli ĉe nia sekretario Lothar Gassmann (vidu adreson sur la paĝo 2), kiu – se Dio permesos – ĉeestos kiel la spirita gvidanto de la vojaĝo.

**Ĉiam denove atingas nin demandoj pri la finvenditaj kajeroj**. Ni ĝojas, ke multaj legantoj kompilas unuopajn kajerojn kaj relegas interesajn artikolojn. Tial ni decidis, la disvenditajn jarkolektojn senŝanĝe kaj iom post iom en la **libra formo** represi – unue la unuajn **jarkolektojn 2009-2011**. Aperis ampleksa libro kun stabila bendado kaj en tre belaj koloroj. La amplekso estas 544 paĝoj kaj kostas (pro malgranda eldonkvanto) 29,80 eŭrojn (plus poŝttarifo). Kiu havas intereson, povas tiun libron samtiel mendi ĉe la sekretariejo (fr. Gassmann, adreso p. 2). Sendado enhavos la fakturon.

*Ŝalom, via Thomas Ebert*

Rückseite

# Vekiĝo aŭ rutino en la komunumo?

Okaze de vekiĝo venas homoj frue en la preĝejon kaj malfrue ili poste foriras.
Okaze de rutino en la komunumo ili venas tuj antaŭ la komenco de la diservo kaj malaperas tuj post la vorto Amen.

Okaze de vekiĝo la unuaj vicoj estas antaŭ la diservo la unuaj plenaj.
Okaze de rutino en la komunumo ĉiuj densiĝas en la lastaj vicoj.

Okaze de vekiĝo la preĝhoro estas pli ol plene frekventata
Okaze de rutino en la komunumo ĝi ne okazas aŭ nur malmultaj venas.

Okaze de vekiĝo multaj sentas bezonon al aliaj homoj diri la evangelion dum misiaj aranĝoj.
Okaze de rutino en la komunumo misia aranĝo pro manko de engaĝo ne okazas.

Preĝu, ke via komunumo fariĝu viva!

L. G.